

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 2/2006 ★ ISSN 0032-2431

Jan Twardowski

*Ne la morton
sed kun ridet'
Sinjor' Dio
degnu preni
de l' viv' mia
rozarion*

(Ĉi tiu versaĵo de pastro Jan Twardowski estis
legita de la episkopo Życiński dum la entombiga
ceremonio. Tradukis Lidia Ligeża)

2

2006
Jubilea jaro

Enhavtabelo:

| | |
|--|---|
| 3 | Re(d)akcie... <i>Kazimierz Leja</i> |
| 4 | Omaĝe al Pastro Jan Twardowski. <i>Tomasz Chmielik</i> |
| 8 | Jan Twardowski – elektitaj versaĵoj <i>Lidia Ligeza</i> |
| 11 | Omaĝe al la Pereintoj <i>Zofia Banet–Fornalowa</i> |
| 13 | Aleksandro Silbernik <i>In Memoriam</i> <i>Zofia Banet–Fornalowa</i> |
| 15 | Travivaĵo en Pollando <i>Maja Wandel</i> |
| 18 | <i>Interpopola Konduto</i> de Edmond Privat: aktuala dokumento ankaŭ 70 jarojn post ĝia apero (fragmentoj) <i>Andreas Künzli</i> |
| 21 | Polaj popolaj papereltondaĵoj <i>Teresa Nemere</i> |
| 23 | PERSONE: Irena Szanser – silueto |
| 26 | Ĉu la Universala Kongreso denove okazos en Pollando? <i>Fondumo Zamenhof</i> |
| 34 | La prepozicio INTER en praktika uzado <i>Czesław Baranowski</i> |
| Inter ili: multaj primovadaj aktualaĵoj. | |
| Sur apartaj folioj: Leteroj de Pola Esperanto– Asocio koncerne la „polajn eventojn”. | |

Pola Esperantisto
sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 2/2006 – ISSN 0032–2431
eldonkvanto (naktad): 250 ekz.

Redaktas: Tomasz Chmielik, Kazimierz LEJA
(ĉefredaktoro), Lidia Ligeza. Konstantaj
kunlaborantoj: Czesław Baranowski,
Danuta Kowalska, Teresa Nemere, Stanisław
Śmigielski.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu
al la Eldonejo HEJME:

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

*La redakcio rezervas al si rajton
mallongigi kaj korekti la tekstojn.*

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
Wydawnictwo Hejme, PL 41–250 Czeladź,
str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda
al: UEA-konto: <kazl–s> aŭ FEL-konto:
<leja–t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6
EUR. Ne pre informu eldonejon pri via pago!

Re(d)akcie...

Kiam mi skribas tiujn vortojn, en Pollando oni rememorigas la forpason — antaŭ unu jaro — de la papo Johano Paŭlo la Dua. Multaj kredantoj kolektiĝis en preĝejoj, sur placoj ka en lokoj, kiuj iamaniere rilatas al la forpasinta papo.

Multaj pilgrimantoj forveturis al Vatikano por tie omaĝi al la amata Sankta Patro ĉe lia tombo.

Politikistoj demonstras publike sian kredon kaj triston, TV rememorigas tempojn kaj agojn de la papo. Tiu ĉi atmosfero bone koincidas kun alproksimiĝanta Pasko, kion esprimas en siaj predikoj pastraro de la eklezio.

Apude oftas demandoj pri vera konduto de tiu ĉi trista kaj pentofara animo de la nacio. Ĉu post kelkaj tagoj — denove — ĉio revenos al sia „normala” stato? Ĉu homoj denove fariĝos brutalaj, sinamantaj, kaj politikistoj denove kverelos?

Ĉiam mi provas kompari landajn eventojn al tiuj de Esperanto-komunumo. Mi, idealisma idioto, revas pri tutesperanta repacigo, konkordo, kunlaboro. De la komenco mi kredis, ke Esperanto scipovas ligi homojn, faligi murojn, enporti freŝan spiriton al ĉiutaga vivo de homo. Eĉ nun mi kredas, ke tio estas ebla.

Kaj malgraŭ la pesimismaj eldiroj kaj aŭguroj de multaj „samideanoj” mi esperas, ke instiga por ni ne devas esti iu trista novaĵo kiu unuiĝus nin; sufiĉus, ke ni prenu en sian koron kaj akceptu en nian menson, ke apuda homo estas kreita laŭ la bildo de Dio, ke tiel granda Homo, kia estis la forpasinta papo Johano Paŭlo la Dua vidis en ĈIU homo sian fraton, kiun

Li povis akcepti kaj ne batali kontraŭ. Kaj tiu ĉi lia sinteno fruktis ne nur inter la kredantoj!

Printempo abundas je rememoroj, kaj la tuta 2006 jaro havos da ili multe. Printempe ni rememorigas pereintojn de holoĉaŭsto, inter kiuj certe estis samideanoj. En multaj esperantistaj lokoj oni festos ĉi-jare ankaŭ jubileojn, i.a. en mia Krakovo, kie ĉio komenciĝis... Ja, krom rememoroj, estas ankoraŭ nuntempo, kiu post kelkaj jaroj fariĝos historio. Kaj kvankam ne estas facile funkcii en tiu detruita Esperantujo, ni vidu almenaŭ strebojn de homoj, kiuj volas fari ion ajn por komuna bono kaj — dediĉante sian tempon kaj energion — provas antaŭenpuŝi la aferojn kvazaŭ neplenumebajn...

Ĉi tiu kajero de *Pola Esperantisto* fariĝis denove iom pli „dika”, por enmeti almenaŭ duonon de posedata eldona materialo. Kiel aldonajon, vi trovos du gravajn leterojn de Pola Esperanto-Asocio kaj ankaŭ invitilojn al esperantistaj okazontaĵoj. Ĉio ĉi sen via krompago, do el la poŝo de iu alia...

Optimisme, sed sen troa espero post pasintaj tri jaroj de aperado, mi atendas viajn kontribuojn, leterojn, ktp. Kaj ne ĉantaĝu min, ke kondiĉigu vian pluan abonon de aperado de viaj humorajoj... kaj de neaperado de tekstoj de sinjoro X aŭ sinjorino Y. La Movado certe bezonas nin ĉiujn, kaj ni provu fari bonajn elektojn... Kion ajn ĉi tio signifus!

Kazimierz Leja

Tomasz Chmielik

Omage al Pastro Jan Twardowski

Jan Twardowski naskiĝis la 1an de junio 1915 en Varsovio. Rakontante pri si li diris, ke li havis tri bonajn fratinojn kaj amantajn gepatrojn, kun kiuj li pasigis kortuŝajn festotagojn. Forta pieco de lia patrino regis en la tuta familio. „Mi rigardas la propran hejmon, tiel malproksiman tempe kaj mi ne vidas tie kruelajn homojn. Mi ne kreskis en timo antaŭ malbono, ĝi ne afliktis min dum la infanaj jaroj, nek reale, nek sonĝe”¹. Li mem nomis sin dorlotita infano de la Disinjoro.

Kiel infano li interesiĝis fervore pri naturo. Ravis lin tio, kio troviĝis ĉirkaŭ li, en ĉi tiu mondo li sentis sin libere. En la mondo homa li sentis sin malkuraĝa, perdis aplombon. Li intimiĝis kun naturo dum siaj forveturoj al la frato de la patrino, kiu havis bieneton apud Varsovio. Tie li pasigis knabaĝe somerferiojn. Li ekkonis bestojn, birdojn, insektojn. kaj plantojn li sekigis kaj kolektis en herbaroj. Li tre ŝatis historiajn librojn kaj verkojn pri naturo. La plej ŝatataj estis por li fabeloj de Andersen, sed fabelojn de fratoj Grimm malŝatigis al li teruraĵoj kaj perfortemo manifestiĝanta tie. Ĝuste li legadis ĉion: romanojn de Żeromski, Krąszewski, Sienkiewicz, Prus, Orzeszko kaj Reymont. El la poetoj li precipe raviĝis pri versaĵoj de Słowacki, Mickiewicz, Lechoń, Baczyński. En la posta vivo li ne malŝatis poemojn de Miłosz, Różewicz, Herbert kaj Szymborska. Ĉiuj ĉi — antaŭmilitaj kaj postmilitaj — legaĵoj formis lin kiel verkiston, kiam li mem kaptis plumon.

Li finis Ŝtatan Matematik–Natursciencan Gimnazion kun la nomo de Tadeusz Czacki en Varsovio. Tie, en 1936, li trapasis abiturientan ekzamenon. Jam kiel liceano li skribis la unuajn poemojn. De 1931 ĝis 1936 li kunredaktis la revuon por gelernantoj *Kuźnica Młodych* (Forĝejo de Junaj Talentoj). En 1937 li komencis studi polan filologion en Varsovia Universitato. Samjare li aperigis sian unuan poemaron *Powrót Andersena* (La reveno de Andersen). Dum la milito li soldatiĝis en Armia Krajowa (Landa Armeo) kaj batalis en 1944, sur barikadoj, dum la Varsovia Insurekcio.

Tuj post la milito, en 1945, li komencis lernadon en la pastra seminario en Varsovio. Oni pastrigis lin en julio 1948. En la interparolo kun Helena Zaworska li klarigis sian decidon pri la pastrigo tiel: „Mi havis ĉi tian bezonon de la spirita vivo. Krome estis la milito, Hitlera okupacio, la Insurekcio, tiom da homoj pereis, mi restis kun tiel premeganta sento, ke ili estas mortintaj, kaj mi plu vivas — oni ne scias, kial”². En 1947 li finis studojn de pola filologio, kiujn interrompis la milito, kaj li magistriĝis ĉe profesoro Waclaw Borowy per sia laboraĵo pri la poemego de Juliusz Słowacki *Godzina myśli* (Pensohoro).

La unua paroĥejo de la juna pastro Twardowski estis Żbików, periferia kvartalo de la urbo Pruszków (apud Varsovio). Tie li pasigis 6 jarojn. Li okupiĝis ankaŭ pri handikapi-

taj infanoj. Poste li plenumis siajn pastrajn devojn en tri Varsoviaj preĝejoj: unue en la kvartaloj Żoliborz kaj Saska Kępa, kaj poste en la preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj ĉe la placo Grzybowski. Ek de la 1a de aŭgusto 1959 ĝis la morto li estis rektoro de la preĝejo de fratinoj Vizitantinoj ĉe la strato Krakowskie Przedmieście. Li famiĝis pro siaj mesoj kaj predikoj al infanoj.

Post la milito li aperigis multajn poemojn, el kiuj pleje gravas *Wiersze* (Poemoj, 1959), *Znak ufności* (Fidosigno, 1970), *Zeszyt w kratkę. Rozmowy z dziećmi i nie tylko z dziećmi* (Kradita kajero. Interparoloj kun infanoj kaj ne nur kun infanoj, 1973), *Niebieskie okulary* (Bluaj okulvitroj, 1980), *Który stwarzasz jagody* (Kiu kreas mirtelojn, 1983), *Na osiołku* (Sur la azeneto, 1986), *Nie przyszedłem pana nawracać. Wiersze 1939–1985* (Mi ne venis, sinjoro, por konverti vin. Poemoj 1939–1985, 1986), *Sumienie ruszyło* (Spronis la konscienco, 1989), *Niecodziennik* (Netaglibro, 1991), *Nie martw się* (Ne ĉagreniĝu, 1992) kaj *Wiersze* (Poemoj, 1993). Liaj poemoj enhavas mesaĝon turnitan al infanoj, junularo kaj plenkreskuloj. Li tamen preferis verki por infanoj. Lia intenco estis klarigi al ili la Evangelion per simpla lingvaĵo.

Ofte la poeto mem diris, ke li skribas nur dum la somerferioj, kiam li disiĝas de siaj ĉiutagaj devoj kaj ripozas. Li nomis sin pastro, kiu skribas poemojn. Per tiuj poemoj li deziris ekligi rilaton kun aliaj homoj, sed ili formas ankaŭ interkomprenigilon kun Dio. Neniam forlasis lin certeco pri la ekzisto de Dio, neniam li dubis pri tio. Kiel li substrekis, ĉiam en la vivo akompanis lin tiu antaŭsento, ke li vidas Dion, ke Dio gvidas lian sorton. Li rimarkis Diajn farojn en tio, kio okazis pri li. Tial li kredis en la venkon de bono super malbono, kaj ankaŭ en tion, ke en la mondo estas pli da bonuloj ol da malbonuloj. „Ĉiam mi vidis la vivosencon. [...] Mi ne ribelis, kaj nur mireĝis”³ — li konfesos multajn jarojn poste.

Pastro Jan Twardowski estis konvinkita, ke sencon havas ankaŭ ĉia sufero. Ĝi estas por la homa bono. Li kredis en Dian justecon, kiu konsistas en malegaleco inter la homoj. Ĝste pro tiu malegaleco unu reciproke bezonas alian.

Por la poeto la amo estas pruvo pri la ekzisto de Dio. Ĝi postulas grandan paciencon. Li mem diris: „lu diris, ke la amo estas la plej nobla sindono al la alia persono. Sed la amo montras ankaŭ humilon. Ĝi instruas aŭskultadon, ĝi ne koleras, pardonas, ĝi ne rezignas malgraŭ ofendoj. En la amo eĉ farita doloro kuracas kaj helpas, kvankam ĝi estas doloro”⁴. Por la amo estas necesa kredo, ĉar ĝi signifas daŭran serĉadon, ĉiamajn dubojn, maltrankvilon. La poeto substrekis, ke la plej granda dramo por la homo estas tiam, kiam li ĉesas ami. Do li konsilas ami ĝis la vivofino, eĉ ne serĉante recipokon. Amon oni devas lerni same, kiel toleremon, kiu ne povas esti senkritika, ĉar poste ĝi fariĝos danĝera.

Jen la simpla vivo–filozofio, kiu estas trovebla en ĉiuj poemoj de pastro Jan Twardowski. Oni devas vidi ĉi poezion tra la prismo de ĝia kreinto — modesta, klinita super homaj sortoj, solidara kun homa sufero, ravita pri la vivo mem. Li parolis pri la gravajoj, kiuj okazas en la homa vivo: kredo, amo, espero, sufero, morto, soleco. Legante oni trovas eĉ ne spuron de moraligo kaj teologia spekulado. La aŭtoro invitis al la interparolo, en kiu li prezentas siajn konsiderojn, travivaĵojn, demandojn, observojn. Ĉi–rilate la leganto ne povas forgesi, ke Jan Twardowski estas pastro. Estus inde citi kelkajn versojn el lia poemo *Wyjaśnienie* (Klarigo):

*Mi ne venis, sinjoro, por konverti vin
cetera el mia kapo forflugis ĉiuj saĝaj predikoj
[...]
mi ne boros al vi truon en la ventro
[...]
simple mi sidiĝos apud vi
kaj mian sekreton konfesos
ke mi, pastro
kredas al la Disinjoro kiel infano.*

Tre kortuŝe pastro Jan Twardowski klarigis al la homo ankaŭ la neceson de suferado en la poemo *Kiedy mówisz* (Kiam vi diras):

*Ne ploru en via letero
ne skribu ke la sorto piedbatis vin
surtere ne estas la situacio sen eliro
kiam Dio fermas pordon — fenestron Li malfermas
spiru libere rigardu
el nubetoj
falas
malgrandaj grandaj feliĉoj necesaj por feliĉo
kaj de ordinaraj lernu trankviliĝi
kaj forgesu ke vi estas kiam vi diras ke vi amas*

Per tiu paradokso „malgrandaj grandaj malfeliĉoj necesaj por feliĉo” la homo konsciiĝas al si, ke ĉiu lia malfeliĉo — eĉ pro okazinta trageduo — estas nenio antaŭ la etero. Li devus sperti tion, ĉar tio estis neevitebla, necesa por lia bono. Eĉ se li malesperas kaj ribelegas kontraŭ la okazinta, Dio neniam forlasas lin senhelpe, ĉar „kiam [Li] fermas pordon — fenestron Li malfermas”. Kaj la lasta verso montras al ĉiuj, kio estas la amo — ĝuste sindono al la alia persono, sinliberigo de la propra egoismo.

El tia vido de la realo ĉe pastro Twardowski naskiĝas klare difinitaj intencoj — eligi kaj montri sencon de la nevidebla, en la malgrava prezenti ion gravan, en la malbezonata — ion bezonatan, en la malsankta — ion sanktan.

En mia plej ŝatata poemo *Sprawiedliwość* (Justeco) la poeto montras ankoraŭ unu paradokson, ke la malegaleco inter la homoj estas justa. Kaj li respondas al duboj kaj hezitoj de la leganto, ke se ĉiuj estus egalaj, ke se al ili doni la samon, kio estis donita al la ceteraj, tiam la mondo estus terura, unu vivus for de alia, neniu bezonus iun. Guste pro tiu malegaleco unu homo sentas sin bezonata por ĉiuj homoj. Kaj tio multe helpas trovi internan ekvilibron kaj kvieton, kiam ŝajnas al ni, ke ni estas senutilaj.

*Se ĉiuj havus po kvar pomoj
se ĉiuj estus fortaj kiel ĉevaloj
se egalparte ĉiuj estus senhelpaj en amo
se ĉiu havus la samon
neniu estus bezonata al iu*

*Dankon al Vi, ke Via justeco estas malegaleco
tion kion mi havas kaj tion kion mi ne havas
eĉ tion kion mi povas doni al neniuj
ĉiam iu bezonas
estas la nokto por ke fariĝu la tago
mallumo por ke brilu stelo
estas lasta renkonto kaj disiĝo unua
ni preĝas ĉar aliaj ne preĝas
ni kredas ĉar aliaj ne kredas
ni mortas por tiuj kiuj ne volas morti
ni amas ĉar malvarmiĝis la koroj ĉe aliaj
unu letero proksimigas ĉar alia malproksimigas
malegalaj bezonas sin reciproke
al ili estas plej facile kompreni ke ĉiu ekzistas por ĉiuj
kaj rekunmeti la tuton*

En siaj poemoj pastro Jan Twardowski ĉiam estis ravita pri la mondo: pri ĝiaj koloroj, sonoj, odoroj, kaj siajn pensojn li esprimas koncize per kelkaj versoj, ne forgesante humuron kaj turnante sian atenton al la plej malgrandaj detaloj, formoj, movo.

Al ni, homoj, kurantaj ĉiutage je mono kaj kariero, la poeto diris ŝerco kaj admone, sed en kiel impresiga maniero: „Faru al vi la demandon — kio plej multe okupas viajn pensojn, dum vi estas laboranta? Se vi pensas pri nova plialtigo de via salajro, avancoj, eniado, se vi pensas nur pri via pozicio — vi ne vivas per amo. Se vi vivas per la bono de tiuj, por kiuj vi laboras, se vi rimarkas la homojn, kun kiuj vi laboras — vi ĉesigas la vivon nur por vi kaj vi ekvivas per amo”⁵.

Tiu eksterordinara poeto kaj modestega homo forpasis la 18an de januaro 2006 en Varsovio.

Notoj:

¹ *Jestem, bo Jesteś. Z księdzem Janem Twardowskim rozmawia Helena Zaworska* (Mi estas, ĉar Vi estas. Kun pastro Jan Twardowski interparolas Helena Zaworska), Krakovo 1999, p. 11.

² Samloke, p. 15.

³ Samloke, p. 40.

⁴ *Elementarz księdza Twardowskiego dla najmłodszego, średniaka i starszego* (Aboclibro de pastro Twardowski por la plej junaj, mezuloj kaj pliaĝuloj), la tekstojn elektis kaj ordigis A. Iwanowska, Krakovo 2000, p. 30.

⁵ Samloke, p. 18.

Jan Twardowski

Petkanto

Dio, centfoje sankta, forta, kaj... ridetanta,
ĉar Vi kreis kolubron, sciuron kaj hipopotamom.
Vivas zebro, papago dank' al Via faro,
teologiojn Vi tiklas per skarablifaroj.
Nun dum tristo, sufoko, tenebro — la peto
super mi ekridetu

Senhejmulino

Al sanktulino mia, senhejma ĉiele
mi preĝas. Kaj Ŝi diras — ĉi-loke mi strangas,
mi preferas kampŝtonojn, flavajn ranunkolon
florantan tiel kurte, de april' ĝis majo,
mankas al mi kulero kaj teo kun lakto;

kiu ĉiele tristas, komprenas la teron

Duope

Travivi la solecon dum restado kune
ne miru kvankam proksimulo foras
mutas tro dense elkreskintaj poploj
du apude fluantaj malkvietaj riveroj
pli apartenas ni al Sinjoro
tial ni mutas estante duope

Dio

Dio, kiun mi ne vidas
kaj iam ekvidos
mi venas senlabora
ekstaras en vico
kaj petas vian amon
kiel pezan laboron

Atendado

Rigardu hundon ligitan antaŭ vendejo
pri sia sinjoro ĝi pensas
kaj vide lin deziras
sur du kruroj atendas
por ĝi sinjoro estas arbaro herbejo hejmo
per okuloj post li ĝi kuras
sopiras per vosto

kisu ĝian piedon
ĉar ĝi instruas kiel atendi Dion

Manoj

Oni diras, ke manoj Viaj ĉion benas
montradas vojon kvazaŭ lumo en tenebro
el hospitala aŭto malsanulon portas
neniam per maŝino en naturo skribas
oni diras ke ili laciĝas malfortas
ke dum miloj da jaroj senĉese laboras
kiel pluvo agemaj, ĝi ne havas tempon
tiom da floroj devas trempi sur tombejo

oni vidas la vundojn kaj desegnas koron
por kredi vere — nune ies kredo fora
kaj sufiĉas mallonge apud vi eksidi
por ekaŭdi sendube — viaj manoj ploras

Ni rapidu

por Anna Kamieńska

Ni hastu ami homojn ili rapide foriras
restos post ili botoj muta telefono
nur bagatelaĵ' trenas sin kiel bovino
kaj gravaĵo rapidas tuj efektiviĝas
poste normala mutito do neeltenebla
kiel ĉasto naskita simple el despero
se pri iu ni pensas jam sen li restante

Ne pensu ke vi tempon havas ĉar certa necerta
prenas de ni sentemon kiel feliĉ' kaj humoro
kiel pasi' duobla pli febla ol unu
tiel rapide foras muta kiel turd' julie
kiel son' malgracia aŭ seka korpklino
por vidi vere oni fermas la okulojn
kvankam pli granda risko naskiĝi ol morti
ni amas tro malmulte kaj ĉiam malfrue

Ne skribu pri am' ofte sed skribu por ĉiam
do vi estos serena kaj forta delfene

Ni hastu ami homojn ili rapide foriras
eĉ tiuj kiuj restas ne ĉiam revenos
kaj oni ne ekscios dirante pri amo
ĉu la unua lastas ĉu lasta primaras

Krono

ALBRUSTI Lian kapon kun hararo eta
sub afable klinita stel' en Betlehemo
de Maria gladitan en hejm' nazareta

kiu kun dorna krono Ĝin al si alpremos?

Li ne timis

Nur la sankta Johano en hejmo efeza
mortis sur la sternaĵo post tera ekspedo,
sola ne timis Krucon, nur li sub Ĝi staris,
aliaj time fuĝis dum Granda Vendredo

kiu fuĝas de Kruco — ricevos pli pezan

Forpelitoj

Ĉu interkisis Adamo kaj Eva
Biblio mutas — homoj nun indiferentas
kvankam pli frue vivas pensas oni poste

kaj tamen kiel estis tie ekster pordo
eble ili parolis rigardante stelojn
verŝajne tie ankaŭ ni nin interamos
amo post ni postkuras kvankam sen la sperto
pli malfacile paŝi edene ol tere

ili ne sciis kiel okulojn rigardi
ĉu tuj kisi aŭ kaŝi subitan kortuŝon

kaj amon unusolan ĉie ni renkontas
antaŭ peko post peko ĝi restas la sama

Ne ĉagrenu

Ne ĉagrenu
ke la Eklezio falos
ke denove pekulo
faras truon en ĉielo
magistro doktoro stultulo
ne ĉagrenu pri Dio
sed pri vi

Versaĵojn tradukis: Lidia Ligeza

Omaĝe al la Pereintoj

*Ilij spiritoj estingiĝas
kiam Ili restas en forgeso...*

Ĉi-jare, la 27an de januaro, en la 61a datreveno de liberigo de murd-koncentrejo Auschwitz-Birkenau fare de Soveta Armeo, por la unua fojo la mondo omaĝis la Pereintojn dum Holokaŭsto.

La Internacian Tagon de Memoro pri Holokaŭsto proklamis Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Tiutage, en la tuta mondo oni omaĝis la memoron de Viktimoj murditaj de naziaj hitleranoj dum la II mondmilito.

Dum la Solenaj Omaĝoj la ombroj de murditoj estis inter ni, en niaj koroj. Ili memorigis pri sia kruela sorto; treto de la elementa homa rajto vivi...

En pluraj diversreligiaj temploj Ili estis memorigitaj per preĝoj, funebraj kantoj, lumigitaj kandeloj...

La Internacia Tago de Memoro pri Holokaŭsto formas por la homaro, por ĉiu homo, moralan devon fari ĉion, por ke neniam plu... Por ke la mondo fariĝu hejmo por ĉiuj homoj.

En Pollando, kie la germanaj nazioj establis la grandparton de murdkoncentrejoj, en kiuj estis murditaj plurnacianoj, sed en sia grandparto judoj destinitaj de hitleranoj al kompleta neniigo, tiu Tago havis tre solenan kaj dignan trapason.

La Solenajojn aranĝis Societo Shalom (Paco) sub gvido de ĝia prezidantino, aktorino kaj reĝisorino — Golda Tencer, kunlabore kun ĉiuj judaj organizaĵoj agantaj en Pollando. Honora Patrono de la Solenajoj estis Prezidento de Pola Respubliko — Lech Kaczyński. Partoprenis

en ili kelkaj ŝtatministroj, reprezentantoj de diplomataro, estroj de komunumaj instancoj, loĝantaro de Varsovio, ankaŭ de aliaj lokoj de Pollando.

La inaŭguro de la Solenajoj okazis ia 26an de januaro je la 16a horo ĉe la Monumento al Herooj de la Varsovia Geto. Ĉeestis ĝin savitoj de Holokaŭsto, registra delegacio, ankaŭ taĉmento de soldatoj honoris, laŭ militista regularo, la Pereintojn. Okazis meto de florkronoj; ĉio surfone de grandaj bruligantaj torĉoj.

Profundan impreson elvokis elpaŝo de mondfama kantoro Israel Rand, el Israelo. Li korsire preĝis omaĝe al la Pereintoj. Per konvenaj al la Solenaĵo kantoj: Kol Nidrej (Ĉiuj Solenaj Promesoj), kiujn oni kutime kantas antaŭ Jom Kipur (Tago de Konkordigo kaj Pento) — la plej grava tago en judaismo, kaj El Male Rachamin (Dio Plena da Mizerikordo) — Preĝo por Spiritoj de Mortintoj. Komence oni recitis ĉi preĝon por Viktimoj de Kruckampanjoj kaj Viktimoj de pogromoj dum ribelo de Bohdan Chmielnicki, 1648. Poste omaĝe al ĉiuj Mortintoj. Per siaj preĝoj la kantoro kortuŝis ĉiujn. Kompletigis la preĝojn rekonata aktoro Krzysztof Gosztyła per sia deklamado de fragmentoj el korskua poemaro „Pieśń o zamordowanym Narodzie Żydowskim” (Kanto pri la neniigita Juda Popolo), verkitan de eminenta verkisto Icchak Kacnelson, kies edzino kaj du filoj estis murditaj en Treblinka, kaj li kun la tria filo en Auschwitz–Birkenau.

Post la Solenajo ĉe la Placo de Ge-

to–Herooj okazis en la Juda Ŝtata Teatro je la nomo de Ester Rachel Kamińska renkontiĝo kun du israelaj aŭtoroj: Jehuda Koren kaj Eilat Negev, verkintoj de libro „Sercem byliśmy wielcy” (Kore ni estis grandaj). Ĝi rilatas eksterordinaran historion de juda familio de nanoj — artistoj kiuj travivis Holokaŭston nur danke... al tio, ke dro Mengele en murdkoncentrejo Auschwitz–Birkenau, kie ili ektroviĝis, realigis je ili siajn kruelajn pseŭdo–medicinajn eksperimentojn. La doloregajn sentojn kiujn ĉi historio vekas estas malfacile esprimi...

Sekvantan tagon la grupo el inter tiuj nepluraj, kiuj transvivis Holokaŭston, forveturis al koncertejo Auschwitz–Birkenau; servanta nun kiel Muzeo al Memoro de la Murditoj por tie omaĝi al la Viktimoj de naziismo.

Tiutage je la 16a horo, laŭ alvoko de la organizantoj de la Solenaĵoj, en pluraj fenestroj de loĝantaro de Pollando ekflamis kandeloj, omaĝe al la Pereintoj.

Dum Holokaŭsto estis neniigitaj, inter milionoj da judoj, pluraj miloj de niaj juddevenaj Samideanoj — adeptoj de Esperanto kaj de Homaranisma idearo de Dro L. L. Zamenhof. Preskaŭ ĉiuj pollandaj... Malgraŭ tiu katastrofa perdo tiuj nepluraj kiuj transvivis, kiel Isaj Dratwer, Jakub Garbar kaj kelkaj aliaj savitoj, kune kun aliaj antaŭmilitaj aktivuloj, sur ruinoj de lando aktive partoprenis en ĝia rekonstruo, ankaŭ laŭeble de preskaŭ tute neniigita Esperanto–movado. Ne estis facile, kaj malgraŭ grandaj penoj de malnovaj esperantistoj kaj la novaj sufiĉe multnombraj adeptoj de Esperanto post grandegaj, nekuraceblaj perdoj neniam ĝis nun, la pollanda Esperanto–movado, eble ankaŭ en kelkaj aliaj landoj, reakiris antaŭan idealisman nivelon.

Mi sentas grandan elkoran bezonon; moralan imperativon, la Viktimojn de nazia rasismo; batalantoj por humana kun-

vivado, revenigi al nia memoro kaj tia maniere omaĝi. Per ĝi esprimi al Ili ankaŭ niajn dankosentojn por ĉio bona, bela, valora kiun Ili por la Afero faris. Temas ne nur pri la historio.

Danke al Iliaj verkoj, idealisma agado entute la heredaĵo el kiu ni ĉerpas por la Movado ĝi daŭras malgraŭ ĉiuj persekutoj kaj laŭeble penas kontribui al pli bona mondo en kiu estos respektata estimo al alieco, rajto digne vivi.

Tiucele, mi verkis plurajn biografiajn artikolojn. Memorigis ankaŭ la Pereintojn de la Familio Zamenhof en monografia verko samtitola. Ankaŭ en la libro „La Pereintoj in Memoriam” alian Sesopon, tre meritajn aktivulojn, verkistojn. Per memorigo mi celas proksimigi Ilin al niaj koroj. Omaĝo al Ili estu simbola al ĉiuj Viktimoj de Holokaŭsto.

Proklamita de Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, por la unua fojo ĉi jare solenata Internacia Tago de Memoro pri Holokaŭsto, plene koincidas al nia celado. La esperantistoj devas en ĝi, en vasta dimensio, partopreni.

Reveno memore kaj sente al niaj Antaŭuloj povas nin signife pririĉigi; stimuli al ĉiam pli idealisma aktivado.

Zamenhofa esperantismo estas nepre bezonata al la Unuiĝanta Eŭropo. Al daŭre plena da konfliktoj mondo, kiuj bedaŭrinde fojfoje ankaŭ nian Esperanto–komunaĵon ne evitas. Per pozitiva, plena da kompreno, sinteno al la proklamita de UN Internacia Tago de Memoro pri Holokaŭsto ni digne omaĝu niajn Pereintojn.

Ni laŭeble ĉerpu de ties atingoj forton por realigado de Zamenhofa Homaranisma Mesaĝo; labori por la pli justa, pli bona mondo.

Varsovio, februare 2006

Zofia Banet-Fornalowa

Aleksandro Silbernik in Memoriam

Ĉi-jare pasas la 100a datreveno de morto de bopatro de D-ro L. L. Zamenhof, Aleksandro Silbernik. Li naskiĝis en 1832 en Wiksan apud Kaŭnas kaj forpasis, post kelksemajna suferado, ĉe sia filino Rozoljo, edziĝinta Lewite, en Varsovio la 25an de marto 1906.

Li estas entombigita ĉe Juda Tombejo, ĉe strato Okopowa en Varsovio. Lia tombo troviĝas en segmento 46, vico 2a. La daton kaj lokon de lia naskiĝo mi trovis ĉe la epitafo sur lia tombo.

Ĉi-loke nepras klarigo. En Esperanto-fontoj oni skribas lian nomon Aleksandro, kaj en nekrologo de D-ro Zamenhof same en la Adresaro estas skribite S. Silbernik. Efektive lia jida antaŭnomo estis Sender kio en la polan kaj Esperanton estis tradukita al Aleksandro. La dua rimarko rilatas tagon de lia forpaso. D-ro Zamenhof en menciita nekrologo skribas, ke S. Silbernik forpasis la 25an de marto. En ĉiuj Esperanto-fontoj estas notita la dato, ke li forpasis la 27an de marto. Povas esti, ke iu eraris kaj aliaj ripetas la eraron aŭ, ke anstataŭ la tagon de morto oni donis la tagon de entombigo.

Neimageble, ke pri tiu plenmerita, honesta homo ne eblas trovi en ĉefaj Esperanto-fontoj elementajn informojn (ekzemple: kiam kaj kie li naskiĝis). En *Enciklopedio de Esperanto* la biografia noto pri li konsistas el tri frazoj. Ankaŭ en aliaj, konsiderataj kiel seriozaj, mankas tiuj donitaĵoj. N. Z. Maimon en sia valorra verko *Kaŝita vivo de Zamenhof* tre alte lin aprezas, sed ankaŭ tie ili mankas. Eblis pri ili ekscii, kiel supre menciite de surskribo troviĝanta sur lia tomba ŝtono. Bedaŭrinde, ĝi estas delonge falita kaj estas nun kovrita per amaso da neĝo, do ni ne havas al ĝi nun aliron. Post nelonge

mi provos trovi ĝin kaj venos en akompano de homo kiu scipovas legi hebree. Eble tiam mi kolektos pli da donitaĵoj, kaj tiamaniere eblos almenaŭ parte pleniĝi tiun hontan breĉon en prezento de tiu neforgesebla persono.

La kontribuo de A. Silbernik al Esperanto estas netrotaksebla. La Esperanto-movado ŝuldas al li grandan dankemon. Sen lia financa helpo la kreinto de Esperanto ne havus eblecon eldoni sian unuan libron de *Lingvo Internacia*, kaj ankaŭ ceterajn plej fruajn Esperanto-verkojn. Lia helpo ne nur limiĝis al tio. Senbrue kaj taktoplene li helpadis al D-ro Zamenhof, dum 15 jaroj vivteni ties familion, malgraŭ ke li ja tute ne estis riĉa. Kune kun alia persono, en sia loĝdomo en Kaŭnas, li posedis negrandan sapo-fabrikon, en kiu li mem laboris ĝis la 74a jaro de sia vivo. Estante homo klera, influita de Haskala, juda klerismo li kaj lia edzino Hadasa el familio Beloch, multe zorgis pri instruiteco de siaj naŭ infanoj (kvin knabinoj kaj kvar knaboj), kaj tio ja ankaŭ postulis elspezojn.

Aleksandro Silbernik ankaŭ morale apogis sian bofilon, kiun li konsideris geniulo. Li montris grandan intereson pri la Afero kaj nelonge post la apero de Esperanto li — kiel skribas D-ro Zamenhof en sia nekrologo — „...ellernis ĝin perfekte”, malgraŭ maljuna aĝo. Lia nomo troviĝas inter la plej fruaj esperantistoj en la *Adresaro*, *Serio II* sub titolo: „Novaj Esperantistoj”. Ĝi aperis nelonge post la unua *Adresaro* kaj estas presita en „La Esperantisto” 1892, paĝo 2. Estas enmetita ankaŭ en „Ludovikologian Dokumentaron XI” sub titolo: „Ludovikaj Adresoj I” sur paĝo 46. Sub n-ro 1438 estas notite: *Silbernik S. Kowno Rusujo*. Kiel „Pioniro” lia nomo troviĝas en „Ora Libro” donacita al ĉiu partoprenanto de la 29a UK okazinta en Varsovio en 1937, okaze de 50-jariĝo de Esperanto.

Li konsoladis ĉiam sian bofilon, kiam la esperoj de tiu ĉi lasta komencis malfortiĝadi. A. Silbernik havis ĉiam grandan amon kaj intereson por la afero Esperanta, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj kiuj troviĝis sur la skribotablo antaŭ lia morto, kiel estis notite en la nekrologo, estis Esperantaj¹.

La nomo de Aleksandro Silbernik neniam devas esti forgesita de esperantistaro. Per sia plurkampa helpo li grave kontribuis al fundamentigo de Esperanto. La Movado devas por sia morala nivelo ĉerpi de lia idealismo.

Li ne nur helpis enkonduki Esperanton en la mondon, sed ankaŭ nun la Movado ĉerpas de tio, kio krom granda idealismo, restis post li; nome domo en Kaŭnas ĉe la strato alinomita al Zamenhofa en la komenco de la 20aj jaroj².

Renovigita kaj adoptita al la bezonoj de la Movado ĝi ekde la inaŭguro, en 1993, bone servas al Litova Esperanto-

¹ „S. Silbernik (nekrologo)”. Ĝi, laŭ peto, de D-ro Zamenhof en aldona letero, ne estas subskribita per lia nomo. Sed, kiel li skribis en ĉi letero, se la redakcio opinios, ke ĝi ne estu sennoma, oni subskribu per „Proksimulo”. La nekrologo estis publikigita en „Lingvo Internacia” 1906, n-ro 8, p. 246-247. De ĝi estas represita en Ludovikito *Originalaro 2*, havanta titolon: „Ĝis la homaranismo”, eldonita en 1990, paĝo 1715-1717. Supre de la nekrologo, publikigita en Ludovikito, troviĝas s.m. letero, sendita al „Presa Esperantista Societo”, 4 IV 1906, el kiu oni ekscias, ke la aŭtoro de nekrologo estas D-ro Zamenhof.

² Tiu evento ne estas unusignife indikita. En verko de Hugo Rollinger „Monumentoj pri Esperanto” estas skribite, ke la inaŭguro okazis en 1923/1959, kaj en la „Enciklopedio de Esperanto” en slogano pri stratoj, ke ĝi okazis en 1925.

Asocio kaj pli vaste al ĉiuj baltaj Esperantaj asocioj kaj entute al la Movado, kiu tie bone evoluas. Danke al tio LEA ekhavis eblecon pasintjare (2005) aranĝi en Vilno — la ĉefurbo de Litovio — la 90an Universalan Kongreson.

Nepras ankaŭ menci, ke kelkaj membroj el Silbernik-familio sukcese aktivis en diversaj landoj, grave kontribuante al la Movado, kaj D-ro Zamenhof restis kun ili en fratecaj rilatoj. Li reciprokis al sia bonfara, idealista bopatro per amo, granda estimo, danko kaj alta aprezo. Tio klare rezultas el liaj pluraj eldiroj en tio en s.m. nekrologo.

Mi persone estas kore tre ligita kun tiu nobla homo kaj provas laŭeble rememorigi lin. Okaze de la 90a datreveno de lia forpaso mi verkis artikolon publikigitan en „Herolde de Esperanto” (novembra, 14a, n-ro 1996). Ankaŭ en monografia verko dediĉita al „La familio Zamenhof” mi lin danke memorigas.

Bedaŭrinde, la verkintoj pri nia historio nemulte da loko al li dediĉas. En s.m. artikolo mi informis, ke lia tomba ŝtono estas falita, kaj ke valorus establi iun fondaĵon, kiu zorgus kaj materie kontribuis al konservado de lia kaj de aliaj tomboj de Pioniroj. Ankaŭ prilaborus ties biografiojn. Envicigos liajn tombojn al Esperanto-itinero.

Pasis 10 jaroj kaj nenio ĉi-rilate ŝanĝiĝis. Mi provis pri la stato de tiu tombo interesigi la prizorganton de la tombejo. Tamen, prenante sub konsideron, ke la grandparto de la familianoj de tiuj, kiuj estas tie entombigitaj, pereis dum Holokaŭsto, samo rilatas aliajn judajn tombejojn en Pollando kaj ke el tiuj, kiuj saviĝis, la grandparto forelmigris, tiukaŭze la juda komunajo estas tre malgranda kaj konsistas ĉefe de maljunaj homoj, la situacio ĉi-rilate estas tre malfacila, nesolvebla ĉar superas ties eblecojn.

La 100a datreveno de forpaso de Alek-

Travivaĝo en Pollando

Antaŭ kelkaj monatoj mi partoprenis en la tradicia mezlerneja vojaĝo al Pollando. La celo estis ekkoni la Holokaŭston, sed por mi estis ankaŭ alia aspekto, rilata al Esperanto: la vizito en la malnova juda tombejo en Varsovio, kie troviĝas la tombo de Zamenhof. Tio estis la plej granda junulara delegacio de Israelo al Pollando.

Ni vizitis la mortigejojn Aŭŝvico–Birkenau, Majdanek kaj Treblinka. Por mi la plej profunda kaj malfacila travivaĝo estis la vizito en Majdanek — tie oni restaŭris grandan parton de la koncentrejo. Ni sekvis la vojon kiun pasis la viktimoj de la alveno ĝis kiam ili estis gasumitaj kaj poste bruligitaj. La unua ĉambro servis por desinfektado. En tiu ĉambro la judoj estis hartonditaj kaj senvestigitaj. La alia parto de la ĉambro estis la duŝejoj kaj de tie la plimulto estis mortigitaj en la gaso–ĉambroj kaj malmultaj estis senditaj al teruraj laboroj en la kampo. La plej ŝoka estis la gaso–ĉambro ĉar ni pensis pri la judoj kiuj antaŭ sesdek jaroj estis mortigitaj sub niaj piedoj.

Ni sekvis al la krematorio kiu estis tre granda kaj donis la impreson de mort-industrio. Poste ni eniris al barako plena de ŝuoj de la viktimoj. Laste ni vidis la cin-

dro–monton, tio estis la cindro de judoj bruligitaj, kaj tie ni havis ceremonion. Tio estis tro por mi, mi kolapsis kaj ploris ĉar mi havis tro da sentoj.

Alia malfacila vizito estis en la morto–fosaĵoj en Lopochova–arbaro. Ni paŝis la padon en kiu la judoj devis paŝi al sia morto tra senfina arbaro, neĝo kaj nebulo kiuj ŝajnigis la lokon malhela kaj timiga. Ni vidis nur barilojn, kandelojn kaj monumentojn. Kvankam oni vidas nenian spuron de la teruraj murdoj, oni rakontis al ni la rakontojn de la judoj kiuj estis mortigitaj kaj ni povis imagi la plej terurajn scenojn.

Laste ni vizitis la judan tombejon en Varsovio kaj vidis la tombon de Zamenhof. Sur la tomboŝtono estas granda verda stelo kaj teksto en Esperanto. Mi rakontis al la tuta grupo pri Zamenhof kaj Esperanto. Ĉiuj aŭskultis kiam mi rakontis, kiel Zamenhof kreis Esperanton por la internacia paco. Poste la gvidanto disdonis flugfoliojn pri Esperanto kaj Zamenhof, kiujn oni preparis speciale por la delegacioj al Pollando. Ĉiuj tre interesiĝis pri Esperanto kaj eĉ volis ke mi instruu ilin.

Dum la tuta vojaĝo ni kantis unu kanton (*estas la tuta mond' tre mallarĝa pont'*); mi instruis la vortojn en Esperanto kaj ĉiuj tre entuziasmiĝis. Ili interesiĝis aŭdi ke mi estas denaska parolanto de Esperanto kaj partoprenis kongresojn en multaj landoj kie mi konatiĝis kun infanoj de la tuta mondo.

Resume, pro tiu ĉi vojaĝo mi pli bone komprenas la Holokaŭston kaj nun pli aprezas tion, kion mi havas — vivon, landon, liberon.



↳ sandro Silbernik — homo modesta kaj nobla, vera bonfaranto, pioniro de la Esperanto–movado devas konsciigi nin pri la devoj rilate lin ankaŭ de aliaj niaj Antaŭuloj. Ili ne restu en forgeso, sed en niaj koroj kaj danka memoro.

Zofia Banet-Fornalowa

Dum vizito de la juda tombejo en Varsovio, la delegacioj kutime nur supraĵe mencias D-ron Zamenhof ĉe ties tombejo.

En 2004 Allon Rotfarb proprainiciate preparis por ELI flugfolion, disdonatan ĉe la tombo al la gelernantoj, kiu flue kondukas en la hebrea lingvo tra la fruhistorio de Esperanto, persekutoj far la nazioj, ĝis la nuntempo.

Aperas en ĝi interalie informoj pri tio, kiel eblas lerni Esperanton, kaj pri la israela movado. 🐾



Mortis Stanisław Lem

En la aĝo de 85 jaroj, la 27an de marto en Krakovo forpasis Stanisław LEM, unu el la plej popularaj kaj plej estimataj polaj verkistoj, aŭtoro de scienc-fikciaj libroj.

Pri morto de Lem informis lia asistento kaj la informon konfirmis Korkliniko *Collegium Medicum* de la Jagelona Universitato.

Stanisław Lem naskiĝis en la jaro 1921 en Lvovo. Lia patro estis kuracisto-laringologo. Kvankam Lem sukcese ekzameniĝis al Lvova Politekniko, pro sia „malbona deveno” ne estis tie akceptita, kaj la patro, utiligante siajn konojn, lokigis lin en medicinajn studojn.

Dum hitlerana okupado Stanisław Lem laboris kiel mekanikisto kaj veldisto. En 1946 jaro, enkadre de repatriado, li translokiĝis kun siaj parencoj al Krakovo, kie kontinuus medicinajn studojn. Kiel li mem diris, influis lian vivon ekkono de dro Mieczysław Choynowski kaj laboro kiel asistento en fondita de dro Choynowski Scienc-Rekona Konservatorio. Studado de logiko, scienca metodologio, psikologio, historio de natursciencoj kaj multaj aliaj, evidentiĝis tre oportuna por scienc-fikcia verkisto.

Li debutis en 1946 jaro per la novelo

Homo el Marso. Kvin jarojn poste aperis lia unua scienc-fikcia romano *Astronaŭtoj*. Sekvaj verkoj de Lem: *Reveno el steloj*, *Solaris*, *Cyberiado* k.m.a., eniris kanonon de la plej konataj scienc-fikciaj verkoj de la XX jarcento. Liaj libroj, tradukitaj al 41 lingvoj, estis eldonitaj en pli ol 27 milionoj da ekzempleroj.

En la jaro 1973 Stanisław Lem estis elektita honora membro de *Science Fiction Writers of America*. La titolon oni poste forprenis, pro liaj kritikaj eldiroj rilate al la usona scienc-fikcia literaturo.

Ses monatojn post la proklamo de la milit-stato en Pollando, la verkisto elmigris al Germanio, kaj poste al Aŭstrio. Al la patrujo li revenis en 1988 jaro.

Lem estas kavaliro de la Ordeno de Blanka Aglo (plej alta distingo en Pollando), honora civitano de Krakovo, doktoro *honoris causa* de: Vroclava Politekniko, Univeritato en Opole, Lvovia Ŝtata Medika Universitato kaj Jagelona Universitato.



Libroeldonado en Esperantujo: jaro 2005

La rubriko „Laste Aperis” en la revuo „Esperanto” registras la librojn, kiujn la Libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro, sendepende de la eldonjaro. „La Ondo de Esperanto”, daŭrigante la iniciaton de „Hungara Vivo”, ĉiujare resumas la rubrikon, kvankam ne ĉiu eldonita libro estas vendata de UEA kaj ne nur freŝe eldonitajn librojn ĝi ekvendadas. Tial la jar-tabeloj estas malpli reprezentaj ol la resumaj tabeloj — sed ne malpli interesaj.

159 libroj eldonitaj en 2005 estas la plej magra rezulto en la lastaj kvin jaroj, ankaŭ la suma paĝokvanto (23 mil 780 paĝoj), sed la sperto diras ke tio apenaŭ estas signo de malfortiĝo de la esperantista eldonado, kaj ke post unu jaro ambaŭ nombroj kreskos.

En 2005 laste aperis 15 ampleksaj kolektoj de diverstemaj franclingvaj artikoloj el la svisa gazeto „La Sentinelle”. Kvankam ili (preskaŭ) ne havas rilaton al Esperanto, ilin verkis esperantisto Edmond Privat. **Libro-Mondo (Pollando)** kaj Arĥivaro Edmond Privat (Svislando) eldonis en la jaro 1993 kelkajn dekojn da kolektoj, kiujn la Libroservo de UEA anoncas iom post iom dum la lastaj jaroj. Ĉi tial ambaŭ eldonejoj por siaj malnovaj represoj kunokupas nun la suprojn en la jar-tabeloj.

Reale, en 2005 plej multajn titolojn eldonis Edition Ittis — temas pri 15 esperantologiaj kaj volapukologiaj broŝuroj en Esperanto kaj en la germana lingvo. Sekvas kun ok libroj du baltaj eldonejoj: „Ryto varpas” el Kaŭno kaj „Sezonoj” el Kaliningrado.

La privata eldonejo de Tomasz Chmielik „Libro-Mondo” avancis UEA. Ĝi estas la plej aktiva libroproduktanto en Esperantujo dum la lastaj 15 jaroj. Oni vidas, ke nur 5 eldonejoj aperigas averaĝe almenaŭ unu libron ĉiusezone (kaj „Sezonoj” nature estas inter ili).

Jaroj 1991-2005

Libro-Mondo (Pollando) 114 libroj

UEA (Nederlando) 106 libroj

FEL (Belgio) 75 libroj

Fonto (Brazilo) 71 libroj

Sezonoj (Ruslando) 62 libroj

Arizona Stelo (Usono) 52 libroj

ĈEE (Cxinio) 51 libroj

Bero (Usono/Nederlando) 48 libroj

KAVA-PECH (Ĉeĥio) 46 libroj

Impeto (Ruslando) 44 libroj

Ĉi tiu tabelo estas unu el pluraj, kiuj aperis en la tradicia statistika revuo en „La Ondo de Esperanto”. 2006, n-ro 2. Ĝi estas legebla en la retejo de „La Ondo” / „Sezonoj” www.esperanto.org/Ondo/ en la rubriko „Novaĵoj”.

H. Gorecka kaj A. Korĵenkov

Zielona Sowa

La krakova eldonejo „Zielona Sowa” (Verda Strigo) aperigis en 2004 la 1135-paĝan „Słownik pisarzy świata” (Vortaro de verkistoj de la mondo). Ĝi ampleksas pli ol 5 milojn da biogramoj. Ili prezentas verkistojn el ĉiuj kontinentoj kaj ĉiuj epokoj. Plej multaj venas kompreneble el Eŭropo kaj Usono. Oni ne forgesis ankaŭ verkistojn el la naciaj minoritatoj, kiuj ne havas apartan ŝtaton, kiel soraboj, katalunoj, kurdoj, tataroj, baŝkiroj. Inter ili – kun granda ĝojo – ni trovis la nomojn de tri esperantistaj aŭtoroj – William Auld, Julio Baghy kaj Kalman Kalocsay. Iliajn biogramojn kompilis Mirosław Dąbrowski. En la vortaro ne aperas polaj verkistoj, kiujn oni prezentis en aparta volumo.

Similaj vortaroj aperadis en ĉiuj landoj eŭropaj (ankaŭ ekster Eŭropo, precipe en Usono). Ili pritraktis verkistojn el nacilingvaj literaturoj, sed ankaŭ el la mondliteraturo. Jam en la antikva tempo aperis la verko de Diogenes Laertios el Cilicio (2a jc.) Vivo kaj opinioj de famaj filozofoj. Turnopunkto en kompilado de vortaroj kaj leksikonoj pri diversaj temoj estis la deksepvoluma „Enciklopedio”, aperinta en Parizo (1751-1765).

Hodiaŭ oni trovas enciklopediojn, kiuj enhavas nur artikolojn pri verkistoj aŭ pri verkistoj kaj temoj, kiel ekz. Dictionnaire historique, thématique et technique des littératures. Littératures française et étrangères, anciennes et modernes (duvoluma, Parizo 1987). Luj prezentas la enhavon limigitan kronologie, ekz. je unu jarcento, kiel Dizionario delle letterature mondiale del Novecento (kun 3426 paĝoj, Milano 1980) aŭ Encyclopaedia of World Literature in the Twentieth Century (kvinvoluma, 1998).

Ĉu ne estus interese trovi similan enciklopedion pri Esperanta literaturo? Jam en 1987, en la Jubilea Jaro, sur la paĝoj de Literatura Foiro, nia redakcia kolego To-

INTERPOPOLA KONDUTO de Edmond Privat: aktuala dokumento ankaŭ 70 jarojn post ĝia apero (fragmentoj el la ĵus reeldonita de Eldonejo HEJME libro)

La libro *Interpopola konduto*, publikigita en 1935 ĉe Literatura Mondo en Budapeŝto, estis franclingve konata sub la titolo *Le choc de patriotismes* kaj aperis en 1931 ĉe Filozofia Kolekto Felix Alcan en Parizo. Tiu verko elstaras kiel originaleca, klarvida provo analizi la genezon de la malamo, perforto kaj milito inter la gentoj. Per ĝi Edmond Privat celis priskribi la problemojn de la naciaj fiero, vanteco kaj egoismo ĉe la popoloj, klopodis klarigi la erarojn de la patriotismo, naciismo kaj mesiismo, la sekvojn de la imperiismo kaj intencis montri la kontraŭdirojn de la nacia(j) moralo(j) en konflikto kun aliaj.

Kiel ideologo — aŭ filozofo — de la interpopola konduto, Privat akre kritikis la vantecan de la gentoj, la sovaĝecon de la militantaj civilizoj, la hipokritecon en diplomatio kaj nesincerecon en interŝtataj rilatoj. Li atentigis pri la malmoreco en la politika kaj armea prak-



masz Chmielik prezentis ĉi ideon. Li eĉ aldonis pli-malpli kompletan liston da artikoloj, kiujn devus ampleksi la estonta verko. Hodiaŭ rimarkinda „enciklopedieca” retpaĝo de Sten Johansson kaj Vikipedio, sed ŝajnas al ni, ke multaj preferus surpaperan leksikonon. La ideo certe ne devus esti forgesita, sed eble realigita per la komunaj fortoj de internacia teamo.

Dume ni gratulas al la eldonejo „Zielona Sowa” pro tiu Esperanta akcento.

tikoj kaj skurĝis la ekscesojn rezultantajn el pasio kaj venĝo en la nomo de la „nacia religio”.

Edmond Privat (1889–1962) apartenis al multflanke aktivaj personecoj kaj talentaj intelektuloj konataj en Svislando (precipe Romandio) kaj respektataj ankaŭ internacie. Kiel studento, historiisto, ĵurnalisto, verkisto, biografo, pedagogo, filozofo, oratoro li disponis pri ampleksaj teoriaj scioj kaj praktikaj spertoj pri diversaj temoj. En siaj roloj kaj funkcioj kiel universitata instruisto, radioredaktoro, mondvojaĝanto, pacaktivulo, kiel partoprenanto en multaj konferencoj, Privat okupis gravajn poziciojn sen karierisma intenco kaj konatiĝis kun sennombraj eminentuloj de sia epoko. Kiel advokato de subpremataj nacioj, kiel mondfederisto, idealisto, socialista demokrato, kaj kiel pledanto por la homaj rajtoj, Privat estis admirata kaj laŭdata, sed liaj ideoj estis neeviteble ankaŭ miskomprenataj kaj kritikataj.

En kiuj rilatoj do konsistas la originaleco, unikeco kaj aktualeco de *Interpopola Konduto*?

La titoloj de la unuopaj ĉapitroj donas impreson pri la temoj, kiujn Privat traktis en *Interpopola Konduto*: Animo nacia, la gento, nacia vanteco, nacia vero, homoj kaj ŝtato, homaj oferoj, ŝtato kontraŭ ŝtato, eklezio kaj ŝtato, interna memkontrolo, klasa konscio, milito kaj revolucio, popola konduto en Hindujo, neperforto en Polujo, mesianismoj, ŝtatoj en societo, kontrolo kaj protekto, akiritaj kutimoj, no-

vaj mistikoj, konkludo.

Privat klarigis en koncerna ĉapitro en la libro *Aventuroj de pioniro* (1962), ke li ekverkis en 1928 libron en la franca lingvo pri la konduto de nacioj inter si kaj pri la kolektiva psikologio de popoloj. Ĝi estis rezulto de studoj, observoj kaj spertoj. Privat estis instigita verki ĉi tiun libron, ĉar li okupiĝis pri la historio de la popolarj ribeloj naciliberigaj kaj pri la enketoj ĉe la slavaj popoloj de orienta Eŭropo, kiuj estis emancipiĝantaj ĉu de la rusa, prusa, aŭstra, turka jugoj.

Falsa historiografio

Kompreneble el tio sekvas, ke inter rivalantaj grupoj gravas la pretendo de la vero: „Inter la faktoj ĉiu elektas la plaĉantaj kaj emas memori nur tiujn, kiujn li ŝatas kredi. Poste li trograndigas ilin kaj traktas kiel mensogojn la flanke lasitajn”, Privat notis en la ĉapitro pri la nacia vero. Ĉi tiu problemo koncernas ekzemple historilibrojn, ĉefe lerneajn, verŝajne en ĉiu lando de la mondo. Precipe gentoj, kiuj longe estis subjugataj, emas glorigi siajn proprajn fortojn kaj atingojn, emfazante la kulpojn de la subjugintoj kaj ignorante la meritojn de triaj roluloj. „Negativaj historiaĵoj rajtas okazi nur en la kontraŭa tendaro”, estas laŭ Privat la problemo, kaj ke „la plej multaj popoloj sin taksas tre alte”, dum la najbarojn oni malestimas aŭ primokas. Alia obstaklo estas, ke en la lernejoj oni ne lernas la tutnacion historion, sed la historion de la nacio (gento) — jen grava diferenco. Kaj: „nur unu historio rajtas esti vera, dum la aliaj estas fabeloj”.

Integra parto de la „prinacia religio” estas la karikaturo pri aliaj. „En la nacia lingvo svarmas la esprimoj neĝentilaj pri aliaj popoloj”. Eĉ ne parolante pri naciaj himnoj, kiuj „rebriligas kolektivajn vantecon kaj malamikecon al aliaj”. Ankaŭ la ĵaluzo kaj pasio ludas rolon. Memkritiko mankas plejparte. „La popolo estas

edukata sen klopodo al scienca kontrolo. Certajn faktojn ĝi lernas. Aliajn ĝi ignoras (...)", Privat admonis. Tial, konklude: „La nacia vero estas privata iluzio, nekompleta fabelo”.

Pri hipokriteco

Kelkaj aliaj ekzemploj el la sprita kolekto de Privat:

„Vi konas eble la respondon de l’afrika ĉefo, demandita, ĉu li punas kiel krimon la forrabon de alies edzino: ‘Certe, li diras, t.e. se iu forŝtelas edzinon de mia gento, ĝi estas krima. Sed, se mi kaptas edzinon de alia gento, ĝi ne estas krima’”.

„Vidu pri armiloj. Tiuj de l’najbaroj nin timigas. Ni aĉetas do pluajn aviadilojn kaj pluajn militŝipojn, tion postulas sekureco’. Ke la najbaroj siavice maltrankviliĝos pri nia aĉeto, tia ideo eĉ ne venas en nian cerbon. (...) Tiel progresadis jam duonjarcenton la konkurado por armiloj (...)”.

Kaj Privat klarigas ankaŭ la logikon, kiu regas dum la senarmigaj konferencoj, kie neniu volas suferi la honton de malvenkisto, perdi sian propran prestiĝon aŭ ricevi truditajn kondiĉojn. En tiaj konferencoj Privat vidis la mankon de racio, „dezertan kampon”. Lia konkludo: „Enkonduki logikon” en tiaj konferencoj signifus „kompletan revolucion”.

Manko de patriotismo aŭ fideleco en armeo estas severa punata. Sed „kiu trompas la poŝtan aŭ impostan oficejon, ne estas juĝata tiel severe”.

„Sendube ploris Maria-Terezia, hejme bonkora patrino, dum ĝi dividis Polujon kun Katarina kaj Frederiko. Sed ju pli ŝi ploris, des pli da teritorio ŝi prenis por Aŭstria Imperio”.

Do, per tiuj kaj similaj frazoj, Privat esprimis la esencon de siaj penso kaj kredo. La aŭtoro de *Interpopola Konduto* pruvus, ke „la fama devizo *celo pravigas rimedojn* montras la frapantan kontraŭecon inter du malaj etikoj”. Tial, Privat multe revis pri „na-

cia gvidanto, kiu renversas tiun sistemon kaj provas praktiki saman etikon por individuaj kaj naciaj agoj, vere rompas la historian tradicion kaj enkondukas tute novan manieron en interpopola konduto". Privat preferis la „unuecon moralan", sur kiu baziĝis la movado de Gandhi kontraŭ la uzo de perforto en Hindio.

Privat pledis por la malaperigo aŭ reduktiĝo de la svisa armeo kaj por la enkonduko de utila civila helpservo anstataŭ arma deĵoro: „Malaperigu tiun armeon aŭ reduktu ĝin al dana formato kaj vi senigus tiel la svisan patriotismon de ĝia ĝisnuna koloro". Ĉu la svisaj soldatoj komprenus tiun sugeston, alvokon?

Esperanto

Kaj ĉar en la Ligo de Nacioj la oficialaj lingvoj estis la angla kaj la franca, ekstus ne nur rivaleco inter tiuj du nacioj, sed multaj malgrandaj nacioj povus kredi, ke temas pri afero de francoj, angloj kaj usonanoj.

Por akceli la internacian kunlaboradon inter la popoloj Privat montris sin konvinkita, ke utilis enkonduki neŭtralan universalan lingvon kiel Esperanto. L.L. Zamenhof estis vera spertulo kaj fakulo pri intergentaj problemoj. Kiel bazo por lia projekto servis la humanisma etiko kaj la principoj de la universalismo kaj neŭtralismo. Kiel disĉiplo de Zamenhof, Privat pluevoluigis, aktuale reformulis kaj konkrete aplikis la teorion de la juda okulkuracisto en ĵurnalismo kaj politiko-diplomatiko.

Kompare kun Esperanto, kiu „entenas ĝuste tiun amikeman mistikon — senkoleraan kaj senmalaman" — Privat konstatis la mankon ĝuste de tiu spirito ĉe la Ligo de Nacioj „por varbi la koron de l'amasoj por lernejo kaj fervoro" (vd. la ĉapitron pri Novaj mistikoj).

Pli alta moralo

Multaj eldiroj en *Interpopola Konduto* en sia principo kaj en multaj kazoj validas ĝis hodiaŭ. Depost la dua mondmilito, almenaŭ en Eŭropo tamen okazis grava ŝanĝo en la primilita sinteno de la homoj. Dum iam „abomeno al milito" sin turnis „kontraŭ la prinacia religio, kiu tro glorigis ĝin", hodiaŭ en Eŭropa Unio, konsistigata de 25 pacamaj ŝtatoj, regas ĝenerale absoluta kaj kelkfoje ekstrema kontraŭmilita sinteno. Ĉiuj ŝtatoj de EU devigis sin laŭkonstitucie respekti la principojn de la paco, demokratio kaj de la homaj rajtoj. Eŭropon ligas tiuj valoroj. Bedaŭrinde, la kontraŭmilita sinteno ne tute ekskludas la militdanĝeron, kie montras pluraj ekzemploj. Laŭ la opinio de multaj, la militintervenoj en eksa Jugoslavio kaj en Irako estas deciditaj kaj efektivigitaj sen respekto de la internacia juro.

Por bridi la blindan nacian pasion, Privat postulis en sia libro la konsideron de „interŝtata moralo" kaj la starigon de „kuna tegmento super la naciaj plafonoj", dum la 'animon', kiun kreis al si ĉiu popolo, „necesus altigi al la sento pri supera kuneco". Alie ĝi estus animo „ne kompleta kaj netaŭga por vivo en socio". Privat bone konsciis, ke „la rilatoj inter la ŝtatoj estas ankoraŭ multe malpli progresintaj ol la rilatoj inter la homoj" kaj ke la „diplomata ĝentileco inter ambasadoraj sinjoroj staras multe pli alte ol la bonvolo inter iliaj nacioj". Finfine, Privat venis al jena konkludo: „Por kunvivi pace, necesas tute alia honorsento. Lojale plenumi promeson, digne malŝati venĝon, esti la unua, kiu rezignas regi la ceterajn aŭ ilin timigi perforte, jen honoro pli taŭga kaj inda je kulturnacio". [...]

Edmond Privat, *Interpopola konduto*, Eldonejo HEJME 2006, 205 mm, 144 paĝoj kun kolora kovrilo. ISBN: 83-920289-3-7.

Polaj popolaj papereltondaĵoj



Proksimiĝas la ĉijara Pasko. Tiu ĉi ĝojiga festo, okazanta dum printempo, en la pola kulturo estas kunligita kun diversaj kutimoj, kiuj ornamas ĝin kaj kreas specifan polan agordon de la festo. Diversaj karakterizaj kutimoj estis rimarkeblaj precipe en polaj vilaĝoj. Inter aliaj tre populara kutimo estis porfesta renovigado kaj posta ornamado de loĝinternoj. En polaj vilaĝaj domoj tiutempe ekaperadis specifaj ornamaĵoj, tonditaj el papero. Tiuj ĉi papereltondaĵoj estas tiom specifaj kaj tiom interesaj, ke ni povas paroli pri la pola arta fenomeno kaj rigardi ilin kiel unu el trezoroj de la pola kulturo.

Kreado de ornamaĵoj tonditaj el papero estis kaj estas konata en diversaj landoj en la mondo. Ĝia komenco estas kunligita kun eltrovo de papero en Ĉinio, do jam komence de nia erao. Unue tiu ĉi arto estis populara en ĉinaj reĝaj kaj nobelaj palacoj kaj de tie ĝi disvastiĝis inter la ĉina popolo kaj poste en aliaj aziaj landoj. Kiam papero venis al Eŭropo (XIV–XV jc.) ankaŭ tie disvolviĝis kutimo krei el ĝi ornamaĵojn per eltondado, precipe en Germanio kaj en skandinavaj landoj.

En Pollando papereltondado ekfloris en vilaĝoj en la XIX jc. — dum la „ora epoko” de la pola popola arto, kiun karakterizis ornamemo de vilaĝanoj, bunteco de ornamelementoj en la vilaĝa vivo. Papereltondaĵoj funkciis tiam kiel ornamaĵoj de vilaĝaj loĝdomoj. La kutimo disvolviĝadis sendepende de diversaj regionoj de la lando en la 70. jaroj de la XIX jc., kiam aperis diverskolora brilpapero.

Tradiciajn formojn de la ornamaĵoj oni tondis el multoble faldita papero; post ĝia dismeto estis legebla la fina formo. Por tondado estis uzata ordinara tondilo, servanta por tondi lanon de ŝafoj, kun larĝa tenilo kaj akraj pintoj.

Kiel ornama elemento de loĝĉambro papertondaĵoj estis gluataj sur muroj ĉirkaŭ bildoj kaj fenestroj, sur la supraj partoj de fornoj, super pordoj kaj sur plafontraboj. Pri papereltondado okupiĝis precipe virinoj, kiuj laŭkutime zorgis pri ornamado de loĝejoj, tamen estas konataj ekzemploj, ke ankaŭ viroj okupiĝis pri tiu ĉi artbranĉo.

La eltondaĵojn oni kutimis fari antaŭ la paska kaj kristnaska festoj, ankaŭ por geedziĝfestoj (komparu la strebojn de Jagna en la romano „Kampanoj” de S. Reymont) okaze de la kutima tiutempe porfesta renovigado de loĝejoj. Tiam per novaj eltondaĵoj oni ornamis la freŝe pentritajn murojn.

La antaŭfesta periodo estis do tempo de konkurado inter la vilaĝaj virinoj kaj knabinoj, kiuj ek de la plej juna aĝo helpadis ĉe la ornamado kaj tiamaniere lernis tondteknikon, ĉiam aldonante novajn, proprajn motivojn laŭ sia imago kaj kreopovo.

Inspirfontoj por la kreado de papereltondaĵoj estis geometriaj formoj kaj motivoj, ĉerpataj de la naturo, ekz. formoj de arboj, floroj, bestoj kaj homoj. Sufiĉe ofte oni ĉerpis ankaŭ motivojn aperantaj en regionaj brodaĵoj. Karakteriza traj-


to de la papereltondaĵoj, kreitaj kiel mur-ornamaĵoj, estis ilia dekoracieco: ĉiuj komponaĵelementoj, sendepende de ilia fontdeveno, estas subordigitaj al ornam-principo de la tutaĵo.

Malgraŭ multaj diversaj formoj de polaj papereltondaĵoj, karakterizaj por diversaj regionoj, oni povas dividi ilin je du fundamentaj grupoj. Al la unua apartenas papertondaĵoj unukoloraj, grafikaspektaj, en kiuj ĉefrolas ne koloro, sed silueto, ornamformo. La duan grupon formas variaĵoj de tondaĵoj multkoloraj, formataj per surgluado de diverskoloraj kaj diversformaj eltondaĵoj unu sur alian aŭ ilia kombinado sur paperrubandoj. Al tiu ĉi grupo apartenas ankaŭ variaj bildoj, komponitaj el diverskoloraj paperelementoj. La plej lertaj tondistinoj formis modelojn imitatataj poste de aliaj, ĉiam kun modifo, depende de la individua kapablo kaj fantazio. La tradiciaj formoj dum longaj jaroj vivis nur en vilaĝa medio de la koncerna regiono.

Komence de la XX jc. tiu ĉi vilaĝa ornamarto estis rekonita kiel interesa en urboj. Post kelka tempo oni komencis uzi paperornamaĵojn en urbaj loĝejoj. Privataj entuziazmuloj komencis kolekti vilaĝajn papereltondaĵojn kaj profesiaj artistoj ofte trovis en tiu ĉi vilaĝa artbranĉo inspiron por la propra kreado. Tiu ĉi populareco daŭris ĝis la unua mondmilito Dum la intermilita periodo en kelkaj regionoj okazis subita malapero de papereltondaĵoj, kaŭzita pro rapidaj ŝanĝoj en vilaĝoj kaj la forta influo de fabrikproduktado kaj aliaj modeloj de la urba kulturo. Post la dua mondmilito, dank' al la ŝtata mecenato oni observas la specifan renesancon de tiu ĉi vilaĝa arto. Papereltondaĵoj jam ne ornamas murojn de vilaĝaj loĝdomoj. Tiun ĉi kuintimon transprenis urbo. La tondaĵoj eka-


peris subvitre sur muroj kaj tabloj en privataj loĝejoj, oni komencis pendigi ilin en lernejoj kaj kulturkluboj kaj pere de la kooperativo „CEPELIA” ili atingis ankaŭ eksterlandon.

En la momento, kiam la papereltondaĵo ĉesis servi por sia tradicia medio, ŝanĝiĝis ĝia funkcio: ĝi fariĝis artverko en si mem, sen atento pri ĝia funkcia rolo. Kune kun tio aperis novaj grandecoj de la ornamaĵoj: multaj miniaturaj formoj kaj ankaŭ grandaj rondformaj komponaĵoj, rememorigantaj desegnojn de iamaj preĝeĵfenestraj vitraloj. Interesa estas tio, ke konserviĝis la tradiciaj, regionaj formoj.



Bonan bildon de la novtempa stato kaj nivelo de tiu ĉi interesa artbranĉo de la pola popola kulturo respegulas rezulto de la tutlanda konkurso, organizita de la Etnografia Muzeo en Toruń. La konkurso partoprenis 218 personojn sendante 7477 laboraĵojn. La formiĝinta tiamaniere valora kolekto de la nuntempaj polaj papereltondaĵoj atestas, ke la tradicia tondlerteco de vilaĝanaj artistoj vivas en Pollando kaj la kreantoj surbaze de la tradiciaj formoj trovas ĉiam novajn temojn kaj novajn komponaĵojn.

Meritas aldoni, ke la kolekto estis prezentita dum multaj ekspozicioj en kaj esksterlande, ĉiam vekante intereson kaj admiron de vizitantoj. La ekspozicio estis organizita en Budapeŝto okaze de la 68 Universala Kongreso de Esperanto. Esperantlingva broŝuro pri polaj popolaj papereltondaĵoj eniris dokumentujojn de ĉiuj kongresanoj. La modesta broŝureto fariĝis bona ambasadoro de la pola kulturo — larĝe informis (ĉ. 5 mil kongresanoj) pri la specifa pola fenomeno, kiu sendube estas polaj papereltondaĵoj — la arto de polaj vilaĝoj, kiu pliriĉigis atingojn de la landa kulturo.



Irena Szanser

En la pasinta, 2005 jaro, la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto–Asocio distingis kelkajn personojn, iamajn aktivulojn de PEA, vunditajn per la fi–fama „puĉo”, per la Honora Membreco. Inter ili troviĝas s-ino Irena Sznaser, pri kies esperantista agado ni citu nur la resumon de vasta biogramo, kompilita el disponeblaj dokumentoj fare de d-ro Bogdan Michalski.

Oni ne povas preterlasi du gravajn faktojn, rilate al s-ino Irena: neniam aperis ŝia plena biogramo (impona, vere impona!), kaj neniam oni publikigis ŝian belan kaj valoran tradukon de poeziaĵoj de Maria Bronikowska, *Pri Janusz Korczak — flustre*, kiujn decidis aperigi — honore al Irena Szanser, kaj omaĝe — al Janusz Korczak, la Eldonejo HEJME kune kun Krakova Societo Esperanto.

Irena Szanser kadre kaj rezulte de multjara didaktika laboro kaj kunlaboro kun la **Centra Kleriga Instituto por Pliperfektigo de Instruistoj** (IKN — en la sekcio de lingvo–instruistoj kaj metodologoj) estis invitata al perfektigaj seminarioj kaj kurso–konferencoj pri lingvo–didaktiko (pri la franca, hispana kaj germana). **Unu el ili**, organizita de IKN en Kleriga Centro en Tarnów (9–17 II 1989) estis dediĉita al **pliperfektigo de filologoj kaj metodologoj** de la franca lingvo (la franca estis laborlingvo). Irena Szanser dum ĝi lekciiis en la franca pri *Esperanto didaktiko lige kun ĝenerala glotodidaktiko* kaj gvidis mallongan sed intensan lecionon de Esperanto (laŭ iom modernigita Cseh–metodo) al la metodologoj de la franca lingvo. Evidentiĝis la **altega lernokapablo de Esperanto pro ilia metodologia preparo** kaj kono de diversaj strategiaj de instruado–lernado. Tio pruvis la taŭgecon de la **instruprogramo verkita de Irena Szanser kunlabore kun IKN** (kaj agnoskita de Ministerio) kaj de la ideo de la intensa *Studumo por diplomitaj fremndligvo–instruistoj, por akiri aldonan specializiĝon en la fako de Esperanto*.

Pro la elstaraj fakeco, lerteco, kaj fakaj meritoj, teoriaj kaj praktikaj, **Irena Szanser** pliriĉigis kaj sistemigis la hodiaŭan scion **pri Esperanto–metodologio**. Malfermis novan sciencajn ekkonon de ĝi, ankaŭ ekster Esperanto–medioj. Ŝi starigis novajn interfakajn kunligojn inter scienco–branĉoj: psikologio, psikolingvistiko, glotodidaktiko en la kampo de Esperanto–didaktiko kaj lige kun ĝenerala glotodidaktiko.

Ŝia faka superrigardo super tiu kampo kaj kapablo ligi teorion kun praktiko, per esploroj gravaj por ĝi, permesis al ŝi doni gravan kontribuon al la nova strukturigo de metodologio kaj ĝia rilatiĝo al Esperanto.

Tiu starigo de novaj semantikaj problemoj al Esperanto–metodologio per kombino de pluraj metodikaj sciencoj demonstros ŝian taŭgecon por la modernigo de lingvo–didaktiko.

Ŝi lekciiis pri Esperanto–metodologio, rilate al ĝenerala glotodidaktiko, ankaŭ ekster E–movadaj medioj.

Laŭ komiso de UEA kaj ILEI, Irena Szanser lekciiis en **Internaciaj Metodikaj Kursoj por rajtigi al lingvo–instruado**,

en la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista en la Chaux-de-Fonds (Svislando). Ŝi estis **ĉeflekciisto en tiuj Internaciaj Pedagogiaj Kursoj** de UEA–ILEI kaj la **aŭtoro de metodologiaj verkoj**, inter aliaj:

- ☞ *Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto–instruado*, 1988, ILEI, UEA, KCE;
- ☞ *Elektitaj problemoj de psikologio por lingvo–instruantoj*, 1989, ILEI, UEA, KCE;
- ☞ *Teorio kaj praktiko de lingvo–instruado*, 1992, ILEI, Budapeŝto;
- ☞ Primetodikaj artikoloj;
- ☞ Instruprogramoj por **UEA, ILEI** pri Internaciaj Lingvaj Ekzamenoj kaj de la kadra programo al Instrurajtigaj Kursoj.

Pri Janusz Korczak – flustre

Antaŭparolo

La 22an de julio 1978 j. pasis la centa datreveno de la nakiĝo de Janusz Korczak. UNESCO enskribis ĉi tiun datrevenon en la Mondan Kalendaron de Datrevenoj. En Pollando oni proklamis la Jaron de Korczak (de la 22a de julio 1978 j. ĝis la 22a de julio 1979 j.). En la programo de la Jaro de Korczak troviĝis jubileaj solenaĵoj, sciencaj sesioj, reeldono de liaj pedagogiaj verkoj kaj libroj por infanoj. Oni fondis en Pollando literaturan premion je la nomo de Korczak pro la plej bona en la mondo libro por infanoj.

La ĉefa principo kaj la enhavo de la vivo de Janusz Korczak estis la batalo por la bono de la infano. Por tiu ideo li dediĉis sian vivon — kaj pereis.

D-ro Janusz Korczak (Henryk Goldszmit) estis laŭeduke kaj laŭprofesie kuracisto–pediatro. Li fariĝis teoriisto pri

edukado kaj edukisto–praktikisto, talenta verkisto, kiu skribis por plenkreskuloj kaj por infanoj. Li estis senlaca publicisto kaj oferema socia aganto kaj pedagogo. Laŭ propra elekto li fariĝis „patro“ de orfiĝintaj judaj kaj kristanaj infanoj, dum multaj jaroj gvidanta orfejojn por ili en Varsovio.

Janusz Korczak skribis multajn librojn por infanoj. En ili li esprimis la devizon de sia vivo: „Ja estas la plej granda feliĉo vivi, labori kaj batali por ke en la mondo estu pli bone“.

Janusz Korczak simpatie rilatis al Esperanto. Ekzemple la fondita de li kaj redaktata de infanoj semajna „Malgranda Revuo“ ĉiujare, la 18an de majo, en la „Tago de Bona Volo“, aperadis en Esperanto kaj estis sendata eksterlanden, por ligi kontaktojn kaj amikan korespondadon kun gejunuloj el diversaj landoj.

Janusz Korczak skribis multajn pedagogiajn disertaĵojn kaj verkojn koncernantajn pedagogiajn problemojn. Siajn premisojn por la eduka laboro li bazigis sur la kompreno de la infana psiko, sur la amo kaj estimo por la edukatoj. Li opiniis, ke pri la bezonoj de la infanoj ne povas decidi nur plenkreskuloj, li ĉiam substrekadis la individuecon de la infano. Multaj liaj ideoj kaj postuloj esprimiĝis en la „Deklaracio pri la Rajtoj de la Infano“ proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en la 1959 jaro.

Janusz Korczak vivas kaj vivos en la homa memoro, kvankam en la 1942 jaro oni mortigis lin kune kun liaj infanoj–orfoj, kiujn li rifuzis forlasi, kiam oni gvidis ilin al gaskameroj en Treblinka. Li tiam havis eblecon savi sian vivon. Li tamen konscie elektis la fidelecon al la infanoj, kiuj fidis al li, sed kiujn oni ne povis savi...

Maria Bronikowska, profunde konanta la unikan personecon de Janusz Korczak, en siaj poeziaĵoj proksimigas al ni lin kaj liajn noblajn idealojn, al kiuj li servis. Ŝia poemaro estas la omaĝo al Janusz Kor-

czak, kaj al ĉio, kio estas bela, nobla, servanta al la Infano, al la Homo.

LA LASTA MARŜO

„Tiu marŝo iranta al eterne
Sub verda standardo de l’espero”

Etaj, pligrandaj, kaj tiuj jam sciantaj,
Ke estas tiom malbone.
Kaj tiuj jam sentantaj, kio estas la mort’.
Ĉiuj kune en kvaropoj marŝas.

Kiel ili povas tiel iri kune?
Grave, silente, en moment’,

Kiu estas eterne.
Kial ili ne krias, ne vokas?

Ĉu estas vero — ke
Duonjarcenton antaŭe vidis vi tiun
marŝon,
La marŝon de l’infanoj
Portantaj kruĉojn larmplenajn.

(La infanoj de la strato 1901)



Invito al la jubilea kongreso de 100-jara GEA Braunschweig, 2-5 junio, 2006

En 2006 GEA festos sian 100-jaran jubileon en sia „naskiĝloko”, nome en Braunschweig, kie ĝi estis fondita la 19an de majo en 1906.

Germana Esperanto-Asocio kaj la LKK, kunlaborante kun la urba gvidantaro de Braunschweig, invitas najbarajn kaj aliajn landajn asociojn por kune memori tiun historian eventon. Ni kore invitas rep-

rezentanton de via landa asocio kaj esperas ankaŭ je multnombra partopreno de esperantistoj el via lando en tiu grava aranĝo.

La Germanaj Esperanto-Kongresoj prezentas diversajn interesajn temojn pri traktatajn per prelegoj kaj diskuttrondoj, kaj spertindan vesperan programon.

Krom la festprelego de d-ro Ulrich Lins okazos prelegoj de d-ro Werner Bormann, d-ro sc. Detlev Blanke, Wera Blanke, Peter Chrdle, Zlatko Tišljar; fakkunsidoj, ekumena diservo, kulturaj programeroj (klasika muziko de Trio el Herzberg, dancmuziko, koncerto de grupo Asorti el Litovio), kaj kompreneble urborigardado en Braunschweig, ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo: Wolfenbüttel, Gifhorn, Herzberg.

Profitu la vojaĝon por resti iom pli longe kaj vizitu la aŭtomobilcentron de Volkswagen aŭ la ekspozicion „phaeno” en Wolfsburg (25 km), restadu kelkajn tagojn en la vivoplena ĉefurbo Berlino (220 km) aŭ partoprenu la postkongresajn tagojn en Herzberg inter 6–9 junio, vizitante la Germanan Esperanto-Centron/ Interkulturan Centron (kun Esperanto-biblioteko kaj arkivo) kaj ripozu dum ekskursoj, migrado en la Nacia Parko Harz.

Detalojn pri la kongreso, aliĝilon vi povas trovi ĉe la kongresa retpaĝo:

www.jubileagek.ic-herzberg.de

Ni esperas je digna, memorinda jubilea festo, kun multnombra germana kaj alilanda partoprenantaro.

Ripetante nian inviton, kun multaj salutoj en la nomo de LKK:

Otto Kern
Zsófia Kóródy
Peter Zilvar
kunlaborantoj de Germana
Esperanto-Centro

Movade

Fondumo Zamenhof en Bjalistoko

Ĉu la Universala Kongreso denove okazos en Pollando?

La 13an de januaro okazis kunveno de la Komitato de la Fondumo Zamenhof en Bjalistoko. Re prezentitaj estis UEA, ILEI, PEA, BES (Bjalistoka Esperanto-Societo), La Urbo Bjalistoko (vicurbestro), Podlahia Vojevodo.

Prof. Hanna Konopka — prezidantino de la Fondumo ekde 1995, estis denove elektita kiel prezidanto de la Komitato. La Komitato akceptis raporton de la Estraro kiun preparis Jarosław Parzyszek — prezidanto, kaj Nina Pietuchowska — sekretario. Ĝi enhavis informojn pri laboro kaj la financoj de la Fondumo por la pasinta periodo. Dum al kunsido okazis vigla diskuto pri la celoj kaj pri la estonto de la Fondumo.

La Komitato elektis por la 3-jara oficperiodo novan, 3-personan Estraron: Jarosław Parzyszek — prezidanto, Nina Pietuchowska — sekretario, kaj Povilas Jegorovas — komitatano.

Dum la kunsido la Komitato decidis kompletigi ankaŭ la Honoran Patronan Komitaton de FZ, kaj elektis d-ron L.C. Zaleski-Zamenhof, prof. Humphrey Tonkin (eksprezidanto de UEA kaj de FZ), d-ron Ulrich Lins (historiisto), Roman Dobrzyński (iniciatinto kaj eksprezidanto de FZ), prof. Witold Stępniewski (vicektoro de la Lublina Politekniko).

La Komitato diskutis pri la aljuĝo de la „Medalo pro Toleremo”. Post la sesjara paŭzo mankis la proponoj kaj neniu rice-

vis tiun medalon. La nuna unusola medalo estis enmanigita en 1999 en Drohiczyn al la forpasinta pasintjare Papo Johano Paŭlo la Dua.

fonto: ret-info

Dum la kunveno, okazinta marte, la Fondumo Zamenhof decidis organizi en la jaro 2009 en Bjalistoko la Universalan Kongreson de Esperanto. Pri la decido oni informis i.a. la UEA-Estraron kaj la Estraron de PEA, kies subteno estas deviga por ke la propono estu aprobita de UEA.

Bedaŭrinde, ni ne disponas pri plena dosiero koncerne al la propono, do ni publikigas nur tion, ricevitan de la FZ.

Estimata Prezidanto de Pola Esperanto-Asocio

Porinforme: la Prezidanto de UEA kaj de la Honora Patrona Komitato de FZ kaj la „membroj” de FZ-Forumo

Dankon pro la formala subteno de nia propono sendita al UEA okazigi la 94an UK en Bjalistoko.

Mi proponas ke la reprezentanto(j) de UEA ekzameni la surlokajn kondiĉojn por tiu celo en junio, kiam okazos la enmanigo de „Medalo pro Toleremo” al profesoro Władysław Bartoszewski, la pola eksministro por esksteraj rilatoj kaj elstara pledanto por internacia (ĉefe: pola-

hebrea-germana) dialogo kaj kunlaboro, la aŭtoro de pli ol 40 (ĉefe historiaj) libroj kaj de pli ol 1200 artikoloj kaj referaĵoj.

Profesoro Bartoszewski vizitos Bjalistokon la 8an kaj la 9an de junio.

Dum la vizito li:

- la 8an, je la 16a, prelogos en la nova Giedroyć-Biblioteko de la Universitato en Bjalistoko laŭ la invito de la rektoro prof. Jerzy Nikitorowicz;

- la 8an, je la 18a, akceptos la „Medalon pro Toleremo” en la Gastpalaceto de Familio Branicki, kie gastigos lin la urbestro de Bjalistoko — Ryszard Tur;

- la 9an, je la 10a, prelegos por la studentoj de Supera Altlernejo de Publika Administrado kaj renkontiĝos kun la eŭrodeputito, la rektoro de tiu altlernejo — profesorino Barbara Kudrycka.

Mi esperas ke la vizito de profesoro Bartoszewski en Bjalistoko estos bona „preteksto” por gastigi ankaŭ la reprezentantojn de UEA kaj PEA kaj aliajn membrojn de la Honora Patrona Komitato de FZ.

Invitante vin ĉiujn al Bjalistoko mi atendas viajn demandojn kaj sugestojn.

Amike via,

Jarosław Parzyszek
Prezidanto de FZ-Estraro

Karaj amikoj, estraranoj kaj membroj de Fondumo Zamenhof kaj Bjalistoka Esperanto-Societo!

Kiel redaktoro kaj eldonisto de „Pola Esperantisto” mi gratuls kaj admiras vian kuraĝon proponi organizon de la UK-2009 en Bjalistoko. Samtempe mi tutkore la iniciaton apogas.

Por la pola Esperanto-movado eble la okazintaĵo fariĝos instiga por resanigi siajn organizajn vicojn kaj firmigi ilin en la formo de tutlanda Federacio de egalrajtaj E-organizaĵoj.

Interese, ke plej valoraj agoj kaj inici-

atoj devenas NE de la „plej granda pola E-Asocio”, kiu — laŭ la Kongresa Regularo — estus devinta organizi la UK-on, sed de lokaj societoj, fondumoj. Eble tiu ĉi fakto instigos ankaŭ la gvidantaron de PEA vekigi el multjara nenionfarado, kaj kaŭzos nur pozitivajn agojn.

„Pola Esperantisto” kaj Eldonejo Hejme restos malfermita al kunlaboro, helpo kaj vasta informado pri via laŭdinda iniciato.

Amike

Kazimierz Leja
Krakova Societo Esperanto



Grava okazintaĵo en la E-movado de Nowy Sącz

Printempe 2005 estis prilaborita projekto por disvolvigo de la Esperanta agado nomata EEEE. Ĝi estas realigata en Universitato de Tria Ago per la kursoj de Esperanto. La Programo de EEEE aperos sur la paĝo www.esperanto.pl.

Realigo de la programo komenciĝis la 13an de oktobro 2005 per prelego: „Esperanto — ponto trans diferencoj” de Roman Dobrzyński por kelkaj centoj da studentoj de la Universitato. La prelego estis ilustrata per filmoj de la preleganto kaj igis grandan intereson. Post ĝi 60 personoj komencis lerni Esperanton. La kursoj estas senpagaj. En februaro estos finitaj la bazaj kursoj kaj komencotaj la kursoj por progresantoj, kiuj daŭros ĝis junio.

La kursanoj estas entuziasmaj, diligentaj kaj kelkaj el ili povas kontinui la lernadon per seminarioj por instruantoj. Tio donas esperon grandigi la instruantaron.

Dum la „Tago de Zamenhofo” (15-12-2005) okazis prelegoj pri la vivo kaj agado de Zamenhofo, pri organizo de Esperanta movado en Pollando kaj en la mondo, pri kongresoj, asocioj, fondaĵoj, libra kaj gazetara servo, instruado de Esperanto en la

mondo. Rezulte de tio kelkaj personoj decidis veturi al la kongreso en Florenco.

La programo dum kelkaj monatoj grandigis la lokan Esperantistaron je 60 anoj.

Sekva paŝo estis eniro kun la ideo de Esperanto al junulara medio. Helpis tion la prelego de Roman Dobrzyński, kiun aŭskultis invitita reprezentanto de Eŭropa Studenta Forumo — AEGEE en Wyższa Szkoła Biznesu (Supera Komerca Lernejo) de Nowy Sącz, Adam Szymczak.

Li, interesiĝata per la prelego, proponis aranĝon de „Esperanto–Tago” en sia lernejo en kadro de Eŭropa Tago de Lingvoj”.

Kun helpo de R. Dobrzyński oni invitis Esperantistojn de PEJ, „Varsovia Vento” el Varsovia Universitato kaj klubo „E-senco” el Poznana Universitato. La studentoj prezentantaj la lingvon por studentoj, tio estis la plej ĝusta formo de informado dum „Ago–Tago”.

Ni vidis la komencigantan amikecon inter studentoj el Nowy Sącz kaj studentoj el Varsovio, Poznano kaj Moskvo. Tio permesas esperi pri ilia kunlaboro kaj kontaktoj kun aliaj universitatoj.

Dum multaj horoj estis prezentataj sur ekrano kaj sur multaj komputiloj reklamoj kaj filmoj pri Esperanto, disdonataj informfolioj, estis ekspozicio de libroj kaj revuoj. Esperantistoj-studentoj gvidis lingvajn lecionojn.

„Ago–Tago” (13.01.2006) daŭris de 9.30 ĝis 14.00. Je la 16a okazis renkonto kun gesinjoroj Handzlik organizita de la studentoj, agantoj de AEGEE. Helpis al ili anoj de Universitato de Tria Ago kaj E-klubanoj. Oni povis observi amikaj rilatoj inter du generacioj — niaj klubaninoj kaj Irmina Szustak el UW, Tobiasz Kazimierski UAM kaj Ksenia Prilepskaja el Moskvo. Ŝi kun konsento de profesoro dum la leciono pri angla lingvo, angle instruis Esperanton – por Poloj. Ĝi estis nekutima leciono! Okazis ankaŭ leciono por klaso de gimnazianoj.

La „Ago–Tago” montris eblecon de intergeneracia kunlaboro, kiun ni dezirus kontinui.

Principaj gastoj de la tago estis gesinjoroj Handzlik, internacie meritaj Esperantistoj. Sinjorino Margareta Handzlik, parlamentanino en Eŭropa Unio tre interese prezentis la problemojn de lingva diverseco en UE. Tiuj problemoj malhelpas en funkciado de la institucio, minacas al egala lingva rajteco de ĉiuj membraj ŝtatoj. Oni ĉesas traduki dokumentojn en lingvojn malpli konatajn, kio kaŭzas ekspansion de la angla lingvo en Eŭropa Unio.

Sinjoro Georgo Handzlik gaje montris facilecon de la lingva lernado kaj Esperantan muzikan kulturon kantante: „Mi dankas al vi Doktoro Esperanto”.

Ni dankas pro la helpo ĉe la organizado de la belaj programoj al Roman Dobrzyński, al gesinjoroj Handzlik kaj al la agantoj de PEJ. Kune ni povas fortigi nian movadon kaj en estonteco disvastigi ĝin.

Ni sciigas gekolegojn, ke en Pollando agas 83 Universitatoj de Tria Ago, en kiuj oni povas realigi nian projekton, se estas tie Esperantaj instruantoj. Ni invitas al kunlaboro kaj oferas helpon bazitan sur nia sperto.

Nia adreso: Sądecki Uniwersytet Trzeciego Wieku, ul Jagiellońska 31, PL 33-300 Nowy Sącz; retpoŝte: korlando@o2.pl

Halina Komar

P.S. Informojn pri la Interreta kurso oni povas ricevi de: vojdan2@rtk.net.pl

La 2an de marto 2006 en Universitato de Tria Aĝo en Nowy Sącz 46 personoj ricevis atestilojn pri la finita 60–hora baza kurso de Esperanto.

Nun komenciĝas konversaciaj ekzercoj, lernado pri Esperantaj historio kaj literaturo, kiuj daŭros ĝis junio.

Informis: Danuta Kowalska

Renaskiĝado de la verda posteno en Dąbrowa Górnicza

Kiam la 15an de decembro 2004 neatendite, dum tradicia celebrado de la Zamenhofa Tago en Sosnowiec'a E-klubejo, aperis modesta figuro de iu malfruiĝinta gasto, neniue el partoprenintoj supozis aŭguri komencon de historia evento, ligita kun ideo rekonstrui „verdan” agadon en proksima al Sosnowiec urbo, Dąbrowa Górnicza.

La prezentita de Rajmund Kubisa, iama E-kursano el Dąbrowa, ideo organizi konstantan E-instruadon en Urba Biblioteko de Fremdaj Lingvoj estis akceptita entuziasme kaj profesie.

Estraro de la E-Klubejo „Verda Pino” en Sosnowiec, decidis organizi kaj instrue helpi la veteranon, kiu pro bonaj rilatoj kun la biblioteka Estraro en Dąbrowa disponigis tie pri bonega kursejo kaj samtempe klubejo por estontaj kurso-progresantoj.

Unua intensiva, laŭ deziro de kursanoj, unumonata E-kurso, okazis en junio 2005 kun junulara grupo de mezlernantoj, gestudentoj kaj instruistoj, gvidata de A. J. Walaszek.

Sekvaj, jam trimonataj, kursoj en la Biblioteko, gviditaj de A. J. Walaszek kaj Kazimierz Leja, fondigis grupeton de progresantoj, kiuj surbaze de konversaciaj, postkursaj okupoj plialtigadas lingvonivelon dum ĉiumerkredaj renkontiĝoj en la sama biblioteko, sed kiel klubanoj kaj studentoj de la lingvo internacia. Pri la okazontaj kursoj informis Radio „Karolina”, kaj dum ilia daŭro raportis loka gazetaro

Al novaj taskoj de la klubanoj, krom partopreno en duonhora intensa konversacio, apartenas laŭtema ordigo de fondiĝinta E-biblioteko kaj prilaboro de Esperanta temvortaro surbaze de similaj alilingvaj vortaretoj.

Kunlaboranta kun la grupeto kol. Rajmund planas prepari kanzonan repertuaron de Esperanta kaj Esperantigita kantareto, sed antaŭ ĉio programon de korespondado, urbovizitado kaj interkluba vizitado. Valoras rimarki, ke la Esperantan libron liveris donace esperantistoj el Sosnowiec, Czeladź, Varsovio kaj Gliwice. Inter plej donacemaj kontribuantoj troviĝis s-ino Zofia Banet-Fornalowa, redaktoro de Pola Esperantisto — Kazimierz Leja, prezidanto de Urba E-Filio en Sosnowiec — Jerzy Walaszek kaj prezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA — Stanisław Mandrak.

Oni devas akceli lingvoperfektigon kaj kontaktojn ĉar post du jaroj t.e. en 2008, esperantistaro de Zagłębie Dąbrowskie festos 100-jariĝon de la Esperanto-Movado en ilia regiono.

Oni devas kolekti E-dokumentojn pri fondigo de unuaj E-Filioj en Dąbrowa Górnicza, Będzin, Sosnowiec, Czeladź kaj aliaj proksimaj urboj, kie aktivis unuaj esperantistoj jam antaŭ 1908 jaro.

Lige kun tio nepras Esperantigi historion de la urbo Dąbrowa kaj regiono, historion de la E-Movado kaj prepari skizan programon de la okazonta kongreso, ktp.

Raportis: A. J. Walaszek



Maŭistoj kaj esperantistoj

„Maŭistaj ribeluloj forkaptis en nepala montaro kvar polojn, kaj inter ili du esperantistojn”, — mi aŭdis la 28an de marto matene en la Pola Radio. Tuj mi pensis, ke temas pri Majena (Marzena) Staniszevska kaj Vojtek (Wojciech) Mysiara. Post unu horo mi certigis — la radio informis pri iliaj nomoj. Tuj mi telefonis al Nepala Esperanto-Asocio.

„Jes, vendrede viaj konatoj pertelefone informis nin, ke dumvoje haltigis ilin

maŭistoj — diris Bharat Kumar Ghimire, la ĝenerala sekretario de NEA. — Sed mi estas certa, ke nenio malbona okazos, ĉar ofte ribelululoj petas monon de turistoj, kiuj eniras ilian teritorion. Se poloj estas jam liberaj — sekvontan vilaĝon ili atingos per piede post kelkaj tagoj. Ni devas atendi”.

Feliĉe, jam posttagmeze oni informis, ke la poloj estas liberaj. Bedaŭrinde, ĝis ĵaŭdo, kiam mi skribas ĉi tiun artikolon, mankas rekta kontakto kun ili.

Majena kaj Vojtek havas po 32 jarojn. Ŝi estas juristino, li — sociologo. Ili ambaŭ finis la universitaton Kopernik en Toruń, Pollando. Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo estis ilia revo delonge. Ili bone prepariĝis por realigi ĝin, interalie lernis Esperanton.

„Ili kredis, ke la internacia lingvo helpos al ili en multaj landoj — rakontas Teresa Nemere, kiu instruis al ili la lingvon”.

En 2003 Majena kaj Vojtek ekvojaĝis. Ili komencis de Ukrainio kaj tuj trovis tie Esperanto-amikojn. Poste ili vizitis Ruslandon, Mongolion, Ĉinion, Vjetnamion, Kamboĝon, Tajlandon, Laoson, Pakistanon, Hindion (Baraton). En Ĉinio ili laboris preskaŭ dum unu jaro strebante gajni monon por plua vojaĝo. Kvankam la poloj ne sukcesis dumvoje instrui Esperanton, kiel ili komence planis, helpe de ĉinaj esperantistoj ili ricevis laboron en lernejo kaj instruis la anglan al ĉinaj infanoj. Dum la tuta tempo la vojaĝantoj raportas pri siaj travivaĵoj en la dulingva retejo: www.naszawyprowa.com. Ili ankaŭ sendas retajn leterojn al sia instruistino.

„Antaŭnelonge ili skribis, ke ili jam tute ne povas imagi sian vojaĝon sen Esperanto — diras Teresa Nemere. — Ili ŝajnas esti tre kontentaj de siaj ĝisnunaj spertoj”.

Dumvoje Majena kaj Vojtek renkontas multajn vojaĝantojn, ankaŭ esperantistojn. Aliaj du personoj, Konrad kaj Maria, kiujn kun ili haltigis maŭistoj, estis poloj, sed ne esperantistoj. Legante la menciitan retejon, oni povas suspekti, ke ambaŭ



vojaĝparoj konatiĝis pere de Interreto kaj decidis renkontiĝi ĝuste en Nepalo. Eble la forkapto estis ilia unua komuna travivaĵo?

Laŭ nepalaj esperantistoj, la poloj elektis la vojon, kiu ekde jaroj troviĝas en la teritorio posedata de maŭistoj, kiuj ekde 1996 batalas kontraŭ la monarĥia registaro de Nepalo. La distanco inter Jiri kaj Lukla — la vilaĝo konata inter homoj, kiuj grimpas Evereston — estas 5 tagoj da marŝado. En Bhandara (duonvoje, 100 km oriente de Katmanduo) kelkaj armistaj partizanoj haltigis la polojn kaj postulis monon. La vojaĝantoj ne volis pagi, do maŭistoj ne permesis al ili plui kaj devigis ilin tranokti en la vilaĝo. La poloj ektimis, telefonis al nepalaj amikoj kaj sekvatage pagis egalvaloron de 280 USD. Lunde ili atingis Lukla, kaj tiam la mondo eksciis pri la danĝera aventuro, kiu ne estis vera forkapto.

Tamen multegaj radioj, televido, gazetoj kaj interretaj portaloj en la tuta mondo informis ĝuste pri forkapto de polaj esperantistoj, ĉar ili ne konis la tutan veron. Feliĉe, la nepalaj esperantistoj pravis — ĉio finiĝis bone. Mi pensas, ke nek la polaj vojaĝantoj, nek la maŭistoj imagas, kiel grandegan reklamon neatendite ili faris por Esperanto.

Kinga Nemere–Czachowska
La Ondo de Esperanto. 2006, N-ro 4–5.

Toruń

La 1an de marto 2006 en la Nikolao Kopernik Universitato en Toruń komenciĝis la kurso de Esperanto por komencantoj. La 30-horan kurson povas partopreni ĉiuj interesuloj, ne nur studentoj. Ĝi daŭros ĝis junio. La kurson gvidas Teresa Nemere, kiu antaŭe instruis Esperanton al studentoj de toruna universitato dum jaroj 1970–90.

Ekde nelonge en Toruń viglas ankaŭ E-klubo. Ĝi havas sian sidejon en la malnova urbocentro, en gotikstila domo, ku apartenas al Societo por Kunlaboro kun Ĝemelitaj Urboj de Toruń.

Kontakto: kingan@umk.pl

Kinga Nemere–Czachowska

„Polaj eventoj”

Estimata Sinjoro Redaktoro

La Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio dum sia kunveno, okazinta la 25an de februaro 2006, priraktis la tiel nomatan „Konkludan raporton pri la polaj eventoj” faritan de la Esperanta Civito, kaj komisiis Stanisław Mandrak — prezidanto, kaj Edward Kozyra — vicprezidanto, analizi detale la aferon kaj prepari respondon. Mi sendas ĝin anekse kaj afable petas publikigi ĝin en Via respektinda periodaĵo.

Antaŭdanke

Edward Kozyra

Ĉar la afero estas grava kaj meritas specialan atenton kaj lokon, ni publikigas la senditan tekston sur apartaj folioj. Valoras ĉi-loke aldoni, ke kelkaj el niaj legantoj skribis al ni petante, ke ni publikigu ĉiujn koncernajn materialojn, aperintajn pri la temo en Interreto kaj en Heroldo de Esperanto. Malgraŭ petoj ni ne faros tion, proponante tamen legi apudan komenton de Libera Folio, kun nia komentario.



Libera Folio

Pola Esperanto-Asocio: „La Civito militas kontraŭ UEA”

2006-03-27

Post longa silento, la estraro de Pola Esperanto-Asocio (PEA) decidis publike komenti la okazaĵojn de 1985, kiam la pola militista registaro gvidata de generalo Jaruzelski eksigis la demokratie elektitan estraron de PEA kaj nomumis novan „komisaran” estraron. En oktobro 2005 la Esperanta Civito publikigis „konkludan raporton” pri la „polaj eventoj”. Laŭ la oficiala reago de PEA, la raporto estas „frukto de ordinara mensogado kaj artifa prisilentado de la vero”. La estraro de PEA konstatas, ke la celo de la Civito evidente estas „ataki UEA-n, konfuzi la movadon, interkvereligi esperantistojn, dividi por regi”.

Laŭ klarigo aperinta en *Heroldo de Esperanto*, en la kazo de la polaj eventoj de 1985 la Senato de la Esperanta Civito estas „kvazaŭ la tribunalo kiu juĝas pri la raporto de la prokuroro”. Ne estas tuj evidente, kial la Esperanta Civito, kiu eĉ ne estis elpensita en 1985, konsideras sin kompetenta fari aŭtoritan juĝon pri la tiutempaj okazaĵoj en Pollando. La konkludoj de la Civito ĉiukaze klare direktas sin kontraŭ UEA kaj SAT.

La Civita raporto plenigis duonan paĝon en septembra-oktobra numero de *Heroldo de Esperanto* en 2005. Ĝia apero en la retejo de la Civito estis promesita „en baldaŭa tempo”, sed ĝis nun ĝi ne videblas en la retejo, kiu cetere lastfoje estis ĝisdatigita antaŭ pli ol jaro. *Libera Folio* nun aperigas la Civitan raporton, ĉar la komuniko de PEA ne estas plene komprenebla sen la teksto al kiu ĝi reagas.

La raporto ne ŝajnas enhavi novajn, antaŭe nepublikigitajn faktojn. Kiel fontoj estas citataj artikoloj aperintaj antaŭ du-deko da jaroj, ekzemple intervjuo de Jerzy Leyk en *Monato* 1/1987. Krom Giorgio Silfer mem (plumnomo de Valerio Ari), la sola atestanto de la okazaĵoj, menciita en la raporto, estas „bone informita persono kiu volas konservi sian anonimecon”.

La „anonima fonto”, kiun citas la Civita raporto, asertas, ke la tiama prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, en 1986 vizitis Pollandon por intertrakti kun Józef Czyrek, membro de la politburoo de la tiama reganta partio de Pollando, Pola Unuiĝinta Laborista Partio (PULP), kiu promesis ŝtatan subvencion al la jubilea Universala Kongreso, okazonta en Varsovio sekvajare. Laŭ la sama fonto, en la renkontiĝo partoprenis Roman Dobrzyński, laŭ la raporto „la tiama prezidanto de PEA”.

Tamen Roman Dobrzyński tiutempe ankoraŭ ne estis prezidanto de PEA, kaj laŭ PEA Humphrey Tonkin eĉ tute ne vizitis Pollandon en 1986. La renkontiĝo kun Józef Czyrek efektive okazis, sed en 1987, kaj ĝi tute ne estis sekreta. La „anonima fonto” kiun citas la raporto, konstateble estis Roman Dobrzyński mem. Lin rekte kontaktis Walter Ŝelazny, unu el la subskribintoj de la Civita raporto. „Tiu transŝovo de la renkontiĝo je tuta jaro ŝajnas ne hazarda eraro, sed intenca manipulo, kun la celo fiksi Roman Dobrzyński en la tempon, kiam komandis la komisaroj”, supozas la estraro de PEA.

Roman Dobrzyński, nun honora membro de UEA, neniam partoprenis la „komisaran” estraron de PEA, sed ja eniris la sekvan, demokratie elektitan estraron. Tiun fakton la verkintoj de la Civita raporto volas kaŝi, supozas la nuna estraro de PEA, kiu publikigis ampleksan refuton de la tuta raporto. „Fakte tiu ĉi kunteksto eksplikas la tutan intrigon. En la

„raporto” mankas rekta akuzo, sed ĝia celo estas klare videbla: la Esperanta Civito uzis la honoran membrecon de Roman Dobrzyński kiel armilon en sia milito kontraŭ UEA”.

La tezoj de la Civita raporto klare montras, kian dividon de la Esperantomovado la Civito volas ekzempli per la elektitaj faktoj kaj fantazioj:

La polaj eventoj montras kvazaŭ paradigme du tendencojn kaj sintenojn, kiuj estas ennaskitaj en la esperantismo.

Unuflanke estas la ideo, ke Esperanto devas evoluigi tiun ni-senton, kiun Zamenhof nomis interna ideo. Ĝi enhavas en si apogon al esprimlibereco, demokratecon, respekton al opinioj kaj homaj rajtoj.

Aliflanke troviĝas forta impulso prezenti Esperanton akceptebla al ĉiuj, ankaŭ kiam la kosto estas fermitaj okuloj al esprimlibereco, demokrateco, respekto al opinioj kaj homaj rajtoj.

Laŭ la verkintoj de la raporto, la Civito evidente estas perfekta ekzemplo de „esprimlibereco, demokrateco kaj respekto al opinioj”, dum UEA estas ekzemplo de la malo. La raporto de la Civito finiĝas per iom konfuza klarigo pri la neceso de organizita opozicio en la demokratia „metodo”.

„...dum UEA mem spite agis tute alidirekten, kaj eĉ elektis s-rojn Andrzej Pettyn kaj Roman Dobrzyński honoraj membroj en julio 2005, ni deduktas ke la supra metodo ne estas aplikata interne de UEA”, sonas la lasta kaj videble plej grava frazo de la raporto.

Ankaŭ SAT, kies planita kongreso ne povis okazi en Pollando pro la estrara puĉo, ricevas kritikon de la Civito. Kvan-kam SAT post la nuligo de la kongreso malferme deklaris sian fortan apogon al „esprimlibereco, demokrateco, respekto de opinioj kaj homaj rajtoj”, laŭ la Civito

tiaj deklaroj valoras nenion, krom se ili venas de la Civito mem, dudek jarojn poste. „Finfine la malinvito faris al SAT senpagan kaj ne meritatan reklamon”, asertas senatano Perla Martinelli en *Heroldo*.

Sub la teksto de la raporto troviĝas la subskriboj de Bertil Nilsson, Lidia Ligęza, Dieter Rooke, Walter Źelazny kaj Nelly Holevitch. El la subskribintoj Lidia Ligęza dum la Esperantaj Tagoj de Krakovo en decembro 2005 publike deklaris, ke ŝi ne nur ne subskribis, sed entute nenion scias pri la raporto sub kiu ŝia nomo troviĝas.

„Tiu deklaro sufiĉas kiel komentario por la tuta intrigo”, konstatas la reprezentantoj de PEA. Aliflanke la komunikado de PEA unuavice ŝajnas esti celita por defendi la honoron de unu nova honora membro de UEA, Roman Dobrzyński.

La alia pola honora membro elektita pasintjare, Andrzej Pettyn, apenaŭ estas menciita en la teksto de PEA. En 1985 Andrzej Pettyn estis la estro de la Esperanto-redakcio de la pola radio kaj aktive partoprenis en la formado de la „komisara” estraro, kiun ankaŭ li mem eniris.

[red] Tiom diras *Libera Folio*. Sur apartaj folioj vi unue tralegu la oficialajn leterojn de PEA. Ĉiuj legantoj devas diferencigi faktojn de starpunktoj, analizoj kaj opinioj. Laŭ mia scio, ne ĉiuj estas trafaj kaj veraj, sed — ne demandita — mi persone ne volas rilati al ili.

Sube mi citu la parton de tre valora letero de iu pola samideano, kiu dum priskribata periodo de la „puĉo” aktivis en pola Esperantujo:

„La nomo ‘Konkluda raporto’ ŝajnigas, ke je tiu ĉi temo la geraportistoj eldiris jam ĉion eldirendan — la tiel nomatan — ‘lastan vorton’.

JEN, kun tio mi MALKONSENTAS, kuraĝante samtempe diri kaj skribi, ke tiu

ĉi ‘raporto’ nek estas la fina sciencnivela laboro, nek iu verdira dokumento internaciskala kaj estas nur iu provo ekkomenca la polemikon por finfine prilumigi sciencnivela kaj objektivaj la tutan historion de Esperanto–Movado en Pollando dum la jaroj 1945–1989.

Tiu ĉi mia eldiraĵo estas nur modesta provo de la laŭvica voĉo de la ano de la Ĉefa Konsilantaro de PEA en 80aj jaroj de la pasinta jarcento.

Certe ankoraŭ multaj aliaj aktivuloj de PEA en 80aj jaroj posedas multajn dokumentojn kaj profundan scion kaj ili povos helpi al sciencistoj vere priskribi tiujn ‘eventojn’.

Kun la citita supre opinio mi tute konsentas: anstataŭ ofendi unu la alian, publike esprimi (ne ĉiam proprajn) opiniojn anstataŭ prezenti faktojn, inciti kaj juĝi, pola Esperantujo — por si mem kaj por la historia vero — devas fondi seriozan, kompetentan Komisionon, kiu finfine kolektos kaj prilaboros dokumentojn, kiuj certe troviĝas i.a. en IPN (Instituto pri Nacia Memoro), enketi „neanonimajn” personojn, kiuj partoprenis tiujn eventojn, kaj — de kio dependas ĉio — ŝanĝi sian sintenon rilate al propra historio kaj propraj arĥivoj. Neniu serioza organizaĵo lasas tiajn aferojn por preskripto; kontraŭe — se ni, polaj esperantistoj, volas konstrui novan kvaliton de nia komuna Esperantujo, ni devas fermi pasintajn tempojn.

Fermi, ne prisilenti.

Kazimierz Leja

La prepozicio **INTER** en praktika uzado

La prepozicio **inter** estas sufiĉe ofte uzata de esperantistoj, do mi volas okupiĝi pri ĝi donante novajn ekzemplojn de ĝia praktika uzado. Tiu ĉi prepozicio (signifanta iasence la malon de **ĉirkaŭ**) estas montranta:

1. **La pozicion de iu aŭ io en la spaco, kiu apartigas du aŭ plurajn personojn (objektojn).** **Ekz.:** Mielno estas pitoreske situanta **inter** la Balta Maro kaj Jamno-lago. **Inter** Ustka kaj Łeba etendiĝas Slovina Nacia Parko. Serĉante ombron ni eniris **inter** la fruktoarbojn. **Inter** du pomujoj troviĝis bela altano. Esperanto rompas ĉiujn lingvajn barojn **inter** la popoloj. **Inter** du numeraloj estis la konjunkcio plus. **Inter** du linioj de skribita teksto devas esti interspaco. Nederlando troviĝas **inter** Germanio, Belgio kaj Atlantiko.

2. **La pozicion de io en la tempo, kiu apartigas du aŭ plurajn momentojn (faktojn).** **Ekz.:** Oni povas ĝui la maron **inter** la leviĝo kaj subiro de la suno. Venu al mi (=ĉe min) **inter** la 15a kaj 16a. Ŝi venis al mi pli malfrue, **inter** la sepa kaj oka horo vespere. Nia renkontiĝo okazis **inter** mardo kaj merkredo.

3. **La situacion de iu aŭ io en aro da personoj aŭ objektoj** (= en la mezo de, en la nombro de). **Ekz.:** Mi ĉiujare pasigas multe da tempo **inter** esperantistoj. Ŝi longe vivis **inter** aktorinoj kaj fariĝis la plej ĉarma **inter** ili. Dum la konkurso pri beleco ŝi estis staranta **inter** pluraj belulinaj. **Inter** fremduloj (= en la ĉesto de fremdaj homoj) ŝi estas ĉiam malparolema. Estas al mi tre agrable **inter** vi. Neniam ĝis nun okazis **inter** ni miskompreno. Oni lasis lin **inter** la mortintoj, kvan-

kam lia koro estis ankoraŭ batanta.

4. **La rilatecon, kiu kunigas du aŭ plurajn personojn akordiĝantajn aŭ malakordiĝantajn.** **Ekz.:** Esperantistoj de la tuta mondo komuniĝas **inter** si tu-te familiare. ĈEP-partoprenantoj interparolas **inter** si nur en la lingvo internacia. **Inter** niaj geklubanoj mankas sindonaj (sindonemaj) aktivuloj. Ili diferencas **inter** si per la aĝo kaj saĝo. La du projektoj havas **inter** si nenion komunan. **Inter** viro kaj virino estas granda diferenco, tamen ili estas ĉiam tre amikaj **inter** si (= unu al la alia). La junulinoj konkuris **inter** si per sia bela staturo kaj neripetbla ĉarmo. Eĉ **inter** du stratulinoj povas esti konkurado.

Rimarkoj:

❖ Se **inter** staras antaŭ du nombroj, ĝi montras proksimumecon. **Ekz.:** Por aĉeti novan biciklon oni devas pagi **inter** 400 kaj 800 zlotojn (= oni devas pagi minimume 400 kaj maksimume 800 zlotojn).

❖ lafoje **inter** montras alternativojn (du aŭ pli da elektebloj). **Ekz.:** Ĉu estas tiel malfacile elekti **inter** honesteco kaj korupto?

❖ Estas diferenco inter du frazoj: Li kuris **inter** ni (= meze de nia grupo). Li kuris **inter** nin (= en la mezon de nia grupo).

❖ Post **inter** oni povas uzi ankaŭ infinitivon. **Ekz.:** Ŝi devis elekti **inter** resti kaj foriri. Gelernantoj ofte elektas **inter** lerni kaj vagabondi.

❖ Oni uzas ankaŭ la kunmetaĵon **tra inter** sed nur tiam, kiam la adjektsubstantivo signas periferion de la interspa-

co. **Ekz.:** La suno brilis sur lin **tra inter** la branĉoj kaj ĝuste tiam **tra inter** ŝiaj lipoj venis la vortoj: „Mi amas vin”.

❖ Al la baza signifo de **inter** povas aldoniĝi nuanco de ligo. **Ekz.:** Loĝante en Darłowo kaj laborante en Koszalin li ĉiutage veturas **inter** tiuj du urboj (temas pri veturado en ambaŭ direktoj).

❖ **Inter** povas ankaŭ esprimi discon aŭ malsimilecon. **Ekz.:** **Inter** kristana religio kaj universala religio, fondita de Mahometo, ekzistas granda diferenco.

Vortfarado kun la prepozicio **inter**:

❖ **intera** = troviĝanta inter aliaj similaj aŭ samspecaj aferoj (objektoj): El la tri domoj la **intera** domo apartenas al mi.

❖ **interere** = en intera pozicio: **Interere** de la fratinoj staris la plej juna fileto.

❖ **interio** = spaco aŭ tempo **inter** du aŭ pli da aferoj: La **interio** de la du domoj estis tre malvasta.

❖ **interaĵo** = intera parto, troviĝanta inter aliaj partoj de la sama afero (objekto).

Rimarko: Ne konfuzu **intera, intere, intero, interaĵo** kun **interna, interne, interno, internaĵo**, kiuj egalas al **ena, ene, eno, enaĵo**.

La prepozicio **inter** funkcias ankaŭ kiel prefiksoido:

❖ **interbatiĝi** = **interbati** sin: La knaboj ludantaj en la korto ofte interbatiĝas.

❖ **interdisputi** = disputi (kvereli) kun iu pri io: Pedagogoj longe interdisputis pri la arto instrui kaj eduki la infanojn.

❖ **interkonatiĝi** = ekkoni unu la alian: Esperantistoj rapide interkonatiĝas.

❖ **Interkonsenti** = akorde agi decidante pri io: Ni interkonsentis diri nenion.

❖ **intermiksi** = miksi unu kun la alia kaj reciproke: Ŝi malgraŭvole intermiksas la prepoziciojn **ĉe** kaj **apud**.

❖ **interrilati** = esti en rilato kun iu:

Ŝi amike interrilatas kun sia najbaro kaj li estas en amikaj interrilatoj kun ŝi.

❖ **interparoli** = paroli unu kun la alia (konversacii): Li ofte interparolas kun ŝi.

❖ **interrompi** = rompi ion inter komenco kaj fino: Ŝi interrompis sian feriadon en Mielno kaj poste li interrompis la korespondadon kun ŝi.

❖ **interŝanĝi** = doni ion, por ricevi ion alian de egala valoro: Li interŝanĝis sian biciklon kontraŭ komputilo. Esperantistoj ofte interŝanĝas salutvortojn.

Sufiĉe ofte uzataj estas ankaŭ aliaj prefiksoidoj (prefiksoj, kiuj laŭ la reguloj de vortfarado funkcias kiel memstaraj vortoj):

internacia, interŝtata, interkontinenta, interplaneda, interparlamentara, intersezona, interurba, interhoma, intermilita, interkisi, interakto (antrakto), interetaĝo, interkonsento, interparolanto, interludo, interlinio, interalie, intertempe ktp.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio „**inter**” el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:

❖ Inter faro kaj rakonto staras meze granda ponto.

❖ Inter voli kaj fari estas grandega paŝo.

❖ Inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela.

❖ Inter generaloj parolu pri bataloj. Inter miaj muroj estu miaj plezuroj.

❖ Inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝas la supo.

❖ Inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi.

❖ Inter la blinduloj reĝas la strabuloj. Inter lupoj krii lupe.

❖ Eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj.

❖ Esti inter martelo kaj amboso.

❖ Interkonsento estas pli bona ol mono.

59a Kongreso de IKUE

59a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista sub protekto de kunpatronoj de Eŭropo, sanktaj Cirilo kaj Metodio, okazos en la tagoj 08–15 de julio 2006 en Velehrad.

Velehrad apartenas al la plej memorindaj lokoj de Ĉeĥio. Ĝi estas unu el la plej gravaj pilgrimlokoj. La kongresejo estos en Pilgrima kaj Spiritekzerca Domo-Stojanov.

Stojanov situas en centro de la urbo Velehrad, 150 m de Baziliko. Ĝi disponas pri 120 loĝlokoj en unu— kaj du—litaj ĉambroj. Troviĝas tie granda kapelo kapablanta akcepti ĉiujn kongresanojn. Je dispono estas tri prelegsalonoj.

Jam nun oni povas aliĝi al la venontjara IKUE-Kongreso en Velehrad, sendante la aliĝilojn kaj aliĝkotizojn al s-ro Miloslav Švaček, Tršická ul. 6, CZ-75127 PENČICE (Ĉeĥio).

Ankaŭ ĉe s-ro Švaček oni povas ricevi diversajn informojn rilate al la kongreso. La aliĝkotizo por poloj estas 15 eŭro, kaj partoprenkotizo pagata surloke 120 eŭroj. Ĝi inkluzivas loĝadon, manĝadon, programon kaj ekskursojn.

(laŭ la informilo de IKUE)

Bogusław Sobol

Vizitu la hejmpaĝon de la Eldonejo HEJME: www.hejme.com.pl. Krom aktualigata ĉiusemajne enhavo, rilatanta la eldonan agadon, vi povas trovi tie ankaŭ materialojn ne publikigitajn en Pola Esperantisto kaj mendi librojn.

Kontribuantoj al la preparata „Pola Antologio” trovos ankaŭ tie necesajn informojn pri kunlaboro.

La Printempo—Tago en Eŭropo, EU-projekto

La unua tago de la printempo estas por polaj lernejanaj okazoj vagabundi dum la leciontempo... Sed tio tute ne interesas la lernantojn de la ILEI—patronata lernejo en Czajowice apud Krakovo... ;)

Tiun tagon jam duafoje okazis en la lernejo debato pri la VALOROJ, kadre de la EU—projekto ‘Spring Day in Europe’ 2006.

Por partopreno en la pasintjara debato pri TOLEREMO la lernejo ricevis grandformatan atestilon kun subskriboj de 6 EU—altranguloj.

La ĉi—jara aranĝon observis lokaj aŭtoritatoj kaj edukistoj. ILEI estis reprezentata de la pola sekiestrino kaj ILEI—komitatanino, Maria Majerczak.

La seriozan diskuton inter la infanoj pri la ĉi—jara temo ‘AMO’ lerte, altnivelle kaj tre interese gvidis du junaj instruistinoj de ĉi tiu lernejo. La diskuto enhavis ankaŭ interkulturajn aspektojn. La direktorino de la lernejo plurfoje forte emfazis la valoron de Eo kaj la rolon de ILEI en la lernejo.

Oni povas trovi pli da informoj pri La Printempo—Tago en Eŭropo en kelkaj retejoj, i.a. en la plurlingva:

http://futurum2005.eun.org/www/pl/pub/futurum2005/index_15mins.htm

http://futurum2005.eun.org/www/pl/pub/futurum2005/index_15mins.htm

Maria Majerczak

Inter 3 (tri) venintaj solvoj de la kvizo, aperinta en la 6/2005 numero de PE, neni bone respondis la demandojn!

Por ĉiuj ni publikigas ĝustajn respondojn:

1a, 2c, 3b, 4a, 5c, 6c, 7b, 8a, 9c, 10b, 11a, 12c, 13a, 14a, 15b.